

le monde de l'ESPÉRANTO

610
numéro

2022-01

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

DOSSIER

Congrès mondial 2022

ACTUALITÉS

Intervjuo kun Saïd Baluĉi
Omaĝo al Claude Nourmont

PAGE 14

PAGE 16

espéranto
France

OFFRE SPÉCIALE !

1€



- livret *Mode d'emploi* de 34 pages
- DVD-rom *Esperanto Elektronike*

en vente à la boutique d'Espéranto-France

<https://butiko-esperanto-france.org/>

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS • à 50 m du métro Bastille
Tél. 01 42 786 886 • info@esperanto-france.org

le monde de l'ESPERANTO

numéro 610

éditorial •

frontartikolo

Tenons la barre !

Nous traversons des tempêtes particulièrement violentes ces derniers mois, avec de mauvaises nouvelles qui succèdent à d'autres, catastrophiques... Guerres, dérives autoritaires, manipulation de la population, crises alimentaires, économiques et climatiques... Les raisons de désespérer de l'humanité sont nombreuses et il faut parfois bien chercher pour trouver des informations positives et rassurantes. Mais il y en a ! Et justement, l'espéranto en fait partie. Au départ d'une rencontre, comme le congrès qui s'est tenu à Trélissac, d'un festival comme NATUR'ist por nova mondo, d'un café espéranto ou d'une rencontre avec un espérantophone en voyage dans notre pays, le sourire revient avec de bons souvenirs basés sur le respect, l'écoute et la tolérance. Ces valeurs intrinsèques de l'espéranto sont plus que jamais nécessaires à l'époque actuelle. Soyons-en les porteurs et défenseurs. Comme par exemple Claude Nourmont a pu l'être pendant toutes ces années d'engagement en faveur de la diffusion et de la culture espérantophone. Nous regrettons son départ en février dernier et lui rendons hommage dans ces pages. Malgré ses problèmes de santé, elle avait commencé à préparer ce numéro, nous nous devions de le terminer. Merci à Claude pour ce travail titanesque, cette patience et cette persévérance. Et merci à tous ceux qui vont répondre aux appels lancés en page 5 pour poursuivre notre action. Contre vents et marées, tenons la barre et gardons le cap pour faire de ce monde un espace de fraternité, de solidarité et de tolérance.

Bruno Flochon, président d'Espéranto-France

Ni tenu la navigstangon !

De pluraj monatoj, ni travivas fortajn ŝtormojn, kun malbonaj novaĵoj kiuj sekvas katastrofojn... Militoj, aŭtoritataj ekscesoj, manipulado de la civitanoj, nutraĵaj krizoj, ekonomiaj kaj klimataj minacoj... Estas multaj kialoj por ke la homaro malesperu kaj foje ni devas multe esplori por trovi pozitivajn kaj trankviligajn informojn. Sed ja ekzistas! Kaj ĝuste, Esperanto estas unu el ili. Forirante de renkontiĝo, kiel la kongreso okazinta en Trélissac, kiel la festivalo NATUR'ist por nova mondo, kiel Esperanta kafejo aŭ renkonto kun esperantisto vojaĝanta en nia lando, revenas la rideto kun belaj memoraĵoj bazitaj sur la respekto, l'aŭskultado kaj la toleremo. Ĉi tiuj internaj valoroj de Esperanto estas pli necesaj ol iam ajn en la nuna epoko. Ni estu ĝiaj portantoj kaj defendantoj. Kiel ekzemple Claude Nourmont povis esti dum multaj jaroj de engaĝiĝo favore al la disvastigo de Esperanto kaj pliriĝo de ĝia kulturo. Ni bedaŭras ŝian foriron pasintan februaron kaj omaĝas ŝin en ĉi tiuj paĝoj. Malgraŭ siaj sanproblemoj, ŝi komencis prepari ĉi tiun numeron, ni devigas nin ĝin fini. Dankon al Claude pro ĉi tiu titana laboro, ĉi tiuj pacienco kaj persistemo. Kaj dankon al ĉiuj, kiuj respondos al la alvokoj faritaj sur la 5-a paĝo por daŭrigi nian agadon. Kontraŭ ĉia problemoj, ni tenu la stirilon kaj sekvu la vojon por fari el ĉi tiu mondo lokon de frateco, solidareco kaj toleremo.

Bruno Flochon, prezidanto de Esperanto-France

koverto: foto el la foto-albumo de UK2022



Sommaire

ACTUALITÉS

- 41^e Conférence générale de l'UNESCO p.4
- L'espéranto
au salon des jeux mathématiques p.5
- Afrikan virinoj retkunvenis p.6
- Visio internationale en espéranto p.6

DOSSIER

- Nia unua UK p.8
- Langue, vie, terre : une décennie
des langues autochtones p.10
- Sukcesa nacia Esperanto-kongreso 2022:
novuloj atestas p.13

ASOCIA VIVO

- Intervjuo kun Said Baluĉi p.14
- Claude, amikino kaj esperantisto p.16
- Francio kaj Germanio: evoluo
de ties lingvopolitiko p.24

KULTURO

- Gvidlibro *Promene tra Vroclavo* p.20
- Dernières parutions chez Vinilkosmo p.21
- Filmo, libroj p.22
- Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA p.22

Revue d'espéranto fondée en 1908,
éditée par Esperanto-France,
4 bis rue de la Ceresaie, F-75004 Paris
Tél. 01 42 786 886 - www.esperanto-france.org
Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org
Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution
Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.
Directeur de publication : B. Flochon
Rédacteur en chef :
mondo@esperanto-france.org
Envoi des articles 1 mois avant parution

Liste des contributeurs : A. Adje, S. Balouchi, C. Barret, B. Flochon, J. Fontaine, M. Komarnicka, F. Lo Jacomo, E. Ludwig, C. Nourmont, E. Richard, M. Raveloharison, G. Tabard, R. Triolle, L. Wolff

Crédits photographiques : suivant indications

Publicité/annonces : à la rédaction

Impression : onlineprinters.fr
Imprimé en novembre 2022
Mise en page : Emmanuelle Richard

ISSN 1628-1942

41^e Conférence générale de l'UNESCO, novembre 2021



Intervention de François Lo Jacomo, représentant de l'UEA (Association mondiale d'espéranto) auprès de l'UNESCO, au débat de politique générale,

Permettez-nous tout d'abord de féliciter Madame la Directrice générale pour sa réélection et de la remercier une fois de plus pour le soutien qu'elle apporte à notre association.

Excellences,

L'UEA, association mondiale d'espéranto, fondée en 1908, partenaire de l'UNESCO depuis 1954 et membre du Bureau de la Conférence des ONG ayant des relations consultatives avec les Nations Unies, est présente dans plus de cent pays. Au Brésil¹, Monsieur le Président de la Conférence générale, nous avons organisé notre congrès universel en 1981 et 2002 et notre actuel vice-président est Brésilien. En Afrique, aux côtés de la langue kiswahili, l'espéranto joue de plus en plus le rôle de langue inter-africaine : en Tanzanie où il est enseigné à l'école, en République Démocratique du Congo où des films sont produits dans cette langue, au Sénégal où se tiendra le prochain congrès africain

1 Le Président nouvellement élu de la Conférence générale, M. Santiago Irazabal Mourao, est délégué permanent du Brésil auprès de l'UNESCO

d'espéranto, au Burundi où vient de paraître un manuel d'espéranto en kiswahili...

En Chine : après avoir traduit *le Courrier de l'UNESCO* en espéranto, notre Organisation a coédité avec l'UNESCO la traduction en espéranto et en chinois de l'ouvrage *Des idées aux actes, 70 années d'UNESCO*. Avec nos partenaires, la Ligue internationale des enseignants espérantistes, l'Organisation mondiale de la jeunesse espérantiste, et avec l'UNESCO, nous nous efforçons de construire une nouvelle Citoyenneté mondiale et nous participons activement au *Festival pour la Paix* qu'un groupe d'O.N.G. organise l'an prochain, avec l'espéranto comme l'une de ses langues de travail.

*Por kontribui al la diskonigo de tutmonda kultura heredaĵo, UEA publikigas libro-serion, Oriento-Okcidento, kun jam 59 tradukoj de famaj verkoj el diversaj kulturoj*². Pour contribuer à faire connaître le patrimoine culturel mondial, l'UEA publie une série de livres, Orient-Occident, avec déjà 59 traductions d'œuvres célèbres de différentes cultures. L'espéranto lui-même n'est-il pas un élément du patrimoine culturel immatériel de l'humanité ?

Le 26 juillet, c'est une journée importante pour les espérantistes. Celle où, en 1887, le rêve d'un jeune juif de Białystok est devenu réalité... et nous souhaitons associer à cette fête tous ceux qui partagent nos valeurs communes : l'aspiration à construire un monde de paix, l'entente entre les peuples, le respect de la diversité culturelle, la solidarité par-delà les frontières.

Pour que nos différences ne soient plus perçues comme un handicap, mais comme une richesse, comme plusieurs visions complémentaires de la réalité, il faut développer une nouvelle forme d'écoute de l'autre comme le permet l'espéranto, par sa sobriété d'apprentissage et sa neutralité.

Je vous remercie.

2 Cette phrase, qui sera dite en espéranto, est traduite par la phrase qui suit.

Neutralny Moresnet

Nova, profesie farita filmo pri la historio de Moresnet aperis en Jutubo: *Neutralny Moresnet* (La neŭtrala Moresnet)
<https://youtu.be/SqaWjD6Nu60>

La filmo venas el Pollando, estas nacilingva, farita de neesperantisto. La kanalo ŚWIAT WCIĄGA¹ – Wojciech Piestrak prezentas interesaĵojn pri la mondo, historio, kulturoj.

En sia kanalo, <https://wojciechpiestrak.pl/zrodla/>, la aŭtoro citas la multajn fontojn de la uzitaj fotoj kaj elektitaj tekstoj.

1 ŚWIAT WCIĄGA: La mondo ensorbas nin



L'espéranto était de nouveau présent au salon des jeux mathématiques

Du jeudi 2 au dimanche 5 juin, place Saint-Sulpice, la fédération Espéranto Paris-Île-de-France a participé au Salon des jeux mathématiques, organisé par l'association Animath, dont François Lo Jacomo est cofondateur et toujours membre du conseil d'administration.

Cela fait plusieurs années que nous réservons un stand gratuit sur ce salon, à la suite de la suggestion de Pascal Hébert, mais il n'y a que deux ans qu'Animath est devenu le principal organisateur du salon et, pendant ces deux années, le salon n'a eu lieu que virtuellement, à cause du Covid-19. Cette année, nous sommes revenus place Saint-Sulpice et avons fait revenir le public, plus nombreux et intéressé par notre stand que précédemment. Nous avons rencontré entre autres des élèves et des enseignants, dont certains avaient déjà commencé à étudier l'espéranto ou avaient l'intention de le faire. Un enseignant nous a proposé de venir le présenter

à sa classe. Même les autres exposants ont montré plus d'intérêt que d'habitude pour notre stand. Nous étions huit à le tenir (Élisabeth Barbay, Lucien Bresler, Melono = Mélaine Desnos, Pierre Gauthier, Aurélien Lestage, François Lo Jacomo, Didier Loison et Laure Patas d'Illiers), généralement deux ou trois en même temps, et nous étions souvent tous occupés simultanément par différents visiteurs. Certains nous ont demandé quel rapport avec les mathématiques, et nous pourrions préparer à l'avenir des documents ou tracts spécifiques pour ce salon. Notre tentative d'utiliser un téléviseur pour montrer



photo : F. Lo Jacomo

un montage sur l'espéranto était à moitié réussie : le téléviseur n'était pas suffisamment visible, toutefois il fonctionnait et il sera possible de le réutiliser à l'avenir. Signalons que le jeu d'Élisabeth Barbay, consistant à montrer que deux minutes suffisent pour apprendre à compter en espéranto, a connu un franc succès.

François Lo Jacomo

Le dépliant *Dans les pas de Tintin* traduit en espéranto

Le Centre culturel Saint-Nazaire espéranto, en collaboration avec l'association « Les 7 Soleils », a traduit en espéranto le dépliant *Dans les pas de Tintin*, désormais disponible à l'office de tourisme de Saint-Nazaire, tout comme les autres versions de ce dépliant traduit en plusieurs langues.

La presse locale (*Ouest France* et *L'Écho de la Presqu'île*) a parlé de cette édition.

info : Chantal Barret
Saint-Nazaire Espéranto



Photo : Jean-Claude Chemin,
de l'association « Les 7 Soleils »

Après le dernier congrès d'Espéranto-France, très réussi en partenariat avec le Groupe Espéranto Périgourdin, l'association dispose d'un nouveau bureau et doit faire avancer les projets dont nous avons parlé lors du congrès et précédemment. Pour que ces projets se relancent et avancent, nous avons besoin de vous !

Espéranto-France recherche des bénévoles pour...

... la boutique (au siège)

Pour renforcer l'équipe qui prépare et envoie les colis aux clients de la boutique.

... la boutique en ligne

Il s'agit de rédiger les notices descriptives des articles de la boutique, afin de permettre à nos clients d'avoir toutes les informations utiles avant d'acheter.

... le système informatique

Pour la base de données de l'association (arthur), de nombreuses améliorations sont souhaitables. Un programmeur est recherché pour ces tâches.

... le site internet esperanto-france.org

Des mises à jour et l'ajout de nouvelles fonctionnalités sont attendus. La version actuelle fonctionne avec SPIP.

... *Esperanto-Aktiv'*

L'infolettre d'Espéranto-France paraissait jusqu'en mai dernier tous les mois avec 3 ou 4 sujets d'actualité courts, en français, pour les membres mais aussi pour tous les contacts de sympathisants. Un support important, envoyé par courriel, pour montrer que l'espéranto est vivant.

... *le Monde de l'Espéranto*

Le Monde de l'Espéranto est orphelin de sa rédactrice en chef, Claude Nourmont, et l'équipe de rédacteurs doit absolument être renforcée pour mieux répartir les rédactions d'articles.

À vos plumes (ou plutôt à vos claviers) !

Nous sommes à votre disposition pour toute question ou idée concrète permettant de faire avancer ces sujets !

Merci pour vos contributions!

Bruno Flochon
président d'Espéranto-France



Afrikanj virinoj retkunvenis


La 29-an de aŭgusto 2021, Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) organizis retrenkontiĝon sub la temo Emancipiĝo de la esperantistaj virinoj en Afriko. Entute 12 personoj partoprenis el DR Kongo, Madagaskaro, Malio, Senegal, Kanado, Nepalo, Brazilo, Germanio, Belgio kaj Togolando.

La etoso estis bona, interesa kaj aparte pro la kontribuoj de eminentuloj en Esperantujo kiel Ĵajro, kiu proponis al ni pri komerco, Belga Artistino, Heidi Goes parolis pri agrikulturo, Didier Apélété Agbolo, togolanda viro, konsilis nin pri regado de projekto kaj John Huang elstara E-komercisto, pri bonaj medicinaj ajloj. Ĉiuj intervenis dum la zum-renkontiĝo.

La retkunvenoj de EVAA celas roli kiel diskutejo, kie virinoj kaj aliaj interesatoj pri virinaj kaŭzoj povas libere interparoli pri emancipaj aspektoj kaj aktivajoj favore al bona disvolviĝado de la afrikanj virinoj esperantistaj. La renkontiĝo estas malfermita al la publiko kaj ĉiuj estos bonvenaj aliĝi kaj partopreni. La venonta retrenkontiĝo ĉefteme enfokusigos pri komerco.

Tiu ĉi retrenkontiĝo okazis sub mia gvido kaj tiu de Alexandrine Omba. Decide ni, virinoj, volas ekmoviĝi agade pri komerco venontjare, ĉar ni kunlaboras unuavice por nia disvolviĝo.

Raportis Miora RAVELOHARISON
Membro de la Afrika Komisiono de UEA



Visio internationale en esperanto pour des lycéens de Salins-les-Bains

Au lycée Victor CONSIDERANT de Salins-les-Bains avec la Russie, le Congo-Kinshasa et la Slovénie



Le mercredi 4 mai, une dizaine d'élèves de terminale ont discuté avec leurs camarades de Tchekoboksary en Russie à 600 km à l'est de Moscou, au bord de la Volga. Étaient invités aussi des élèves de la ville de Rutshuru dans la région des Grands lacs au Congo et d'autres de Koper en Slovénie.

Chacun a pu se présenter. Un jeune russe a joué du piano en direct. Les filles russes s'étaient filmées la veille et ont pu présenter leur performance de hip-hop.

Les Slovènes avaient préparé un diaporama pour présenter leur établissement avec vue sur la Mer Adriatique. Ces images ont rappelé des souvenirs à une élève de Salins. Elle avait déjà visité Koper avec ses camarades de seconde en 2019.

Les Salinois avaient préparé une saynète. Leur enseignant a présenté un diaporama avec des photos des paysages visibles depuis l'établissement.

Nous regrettons que les problèmes techniques n'aient pas permis aux Congolais de se connecter durablement. Nous espérons pouvoir les voir et les entendre une autre fois.

Donc 4 écoles de 4 pays.

Les élèves de Salins sont ravis et prêts à poursuivre les contacts avec les jeunes

des autres pays y compris et surtout en ces temps de tensions dans le Monde.

Cette visio s'inscrit dans le cadre des activités de l'atelier d'espéranto de la Cité scolaire, un des éléments de la politique d'ouverture internationale de la Cité scolaire.

Cette visio a d'ores et déjà fait grand bruit chez les espérantophones du monde entier où Salins devient un nom connu depuis quelques années.

Nous avons eu le plaisir d'avoir tout le long de la visio un invité de marque en la personne de Ahmad Reza MAMDUHI, président de l'association mondiale des profs d'espéranto.

Il était connecté depuis l'Iran.

Étaient aussi avec nous une Géorgienne et un prof de maths et d'espéranto à Chaumont, ainsi que d'autres (notamment de l'association Espéranto-Bourg-en-Bresse).

Les élèves et leur enseignant, Emmanuel DESBRIÈRES, remercient toutes les personnes qui ont œuvré ici (aide informatique, aide administrative, etc.) et là-bas (notamment les enseignants : Elena NADIKOVA, Joël MUHIRE et Peter GREBC) pour qu'ils puissent vivre ce bon moment.

Emmanuel Desbrières



Kelkaj el la 500 partoprenantoj, kiuj sukcesis trovi lokon sur la komuna foto sur la granda ŝtuparo de la placo de festivaloj (foto el la foto-albumo UK2022)

Congrès mondial d'Espéranto 2022 à Montréal

Après deux années d'interruption pour cause de restrictions et de situation sanitaire internationale compliquée, un congrès mondial d'espéranto en présentiel s'est enfin tenu à Montréal. L'équipe d'organisation de ce congrès a été particulièrement patiente, ayant démarré les travaux préparatoires en 2014...

Tout d'abord, la candidature n'a pas été immédiatement acceptée, puis le congrès prévu en 2020 a été décalé en 2022. Il en est résulté trois changements de lieu de rencontre ! C'est finalement l'Université du Québec à Montréal qui a accueilli les congressistes pour les activités de journée, et le cinéma Impérial, qui a accueilli les spectacles des soirées culturelles.

Si le nombre d'inscrits a atteint 880, les participants effectivement présents étaient moins nombreux. Certains ont en effet redouté les diverses contraintes sanitaires et administratives imposées par le Canada aux visiteurs étrangers. Autre fait marquant, de nombreux jeunes étaient présents, ce qui donne de belles perspectives pour l'avenir de l'espéranto. Au-delà de l'organisation d'un programme spécifique pour les jeunes, certains d'entre eux se sont fortement impliqués dans le programme du congrès lui-même et dans diverses missions de bénévoles. Autre particularité liée à la localisation du congrès, c'était son accessibilité par les transports en commun (avec même un accès direct souterrain depuis la station de métro !) et sa proximité avec le centre-ville, ses commerces, hôtels et restaurants.

Un programme riche et varié

Dès le samedi soir avant l'ouverture officielle, la diversité était déjà bien visible, au sein de la désormais traditionnelle « movada foiro » : une vingtaine d'associations ont présenté leurs activités en espéranto, du végétarisme au naturisme en passant par la littérature, le bouddhisme, les sciences, le droit, etc. ainsi que de nombreuses associations nationales – dont Espéranto-France. L'ouverture officielle est toujours un temps fort apprécié, mal-

gré son côté formel et solennel. C'est l'occasion d'apprendre les dernières actualités sur le mouvement espéranto, avec certaines interventions intéressantes qui mettent vite dans le « bain inter-culturel » du congrès. Sans oublier les pauses musicales et le chant final de « La Espero ».

La photo officielle qui a suivi la cérémonie d'ouverture a été prise sur les marches jouxtant le musée d'art contemporain voisin, dans un ordre quelque peu dispersé. Une bonne partie des congressistes était cependant au rendez-vous sous un beau ciel bleu ensoleillé idéal pour la photo souvenir !

La diversité était au cœur du programme de cette édition avec la mise en avant des peuples et des langues indigènes d'Amérique, notamment du Canada (voir l'article de Gilles Tabard).

Ce thème coïncidait parfaitement avec les événements organisés dans la ville à cette période pour faire connaître l'histoire et la culture des peuples autochtones. Autre symbole de diversité qui a chevauché le congrès, la semaine de la « Fierté » de Montréal, qui célébrait la diversité et la reconnaissance des droits LGBT. À ce sujet, l'association LSG (Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj) a trouvé un nouveau souffle avec le renouvellement de son conseil d'administration après quelques années de léthargie...

Outre les nombreuses conférences et réunions-débats qui animaient chaque jour, signalons les répétitions du chœur international (qui s'est produit lors de la dernière soirée), des projections



Des bénévoles heureux d'accueillir les congressistes (photo de l'album photo UK2022)



Office à la cathédrale anglicane de Montréal. (photo de l'album photo UK2022)

de films sous-titrés en espéranto, des cours d'espéranto pour débutants et progressants, l'Université du congrès avec ses interventions de haut niveau, de la littérature, des sciences, des sessions d'examen, et les incontournables vente aux enchères et soirée dansante.

Il faut signaler aussi le service œcuménique du dimanche en espéranto, assuré par Joël Amis et Hans Becklin, dans la cathédrale anglicane de Montréal. L'autel était surmonté d'un superbe dais arc-en-ciel. Une soixantaine de personnes ont participé à cet office très vivant.

Une séquence a aussi été organisée pour un hommage à Claude Nourmont, permettant à des personnes du monde entier de témoigner de leur amitié et des moments partagés avec elle depuis plus de 50 ans, notamment lors des multiples congrès auxquels elle a participé ou qu'elle a elle-même contribué à organiser.

Des spectacles d'excellente qualité

Les différents spectacles se sont enchaînés soir après soir avec une richesse exceptionnelle : chants et danses amérindiens, lutte de chants de gorge inuits, danses traditionnelles, folklore québécois, chanson populaire, piano et soprano, balade romantique, jazz, bossa-nova, samba, flûte, banjo, et le fameux opéra-rock *Starmania* adapté en espéranto *Stelmani*. Beaucoup ont été impressionnés par les chants de gorge inuits, qui semblaient venir d'un autre monde. Le cinéma Impérial, situé dans le quartier des spectacles, en plein cœur de Montréal, offrait un écrin tout à fait adapté, avec son décor de théâtre à l'ancienne, sa scène surélevée, son balcon très pentu et ses sièges en velours confortables.

Une pièce de théâtre a permis de retracer la venue de Zamenhof, accueilli quasiment comme un chef d'État, au premier congrès américain d'espéranto à New York en 1910, puis son excursion au Canada, où il a retrouvé de la famille.

Cette diversité de représentations artistiques justifie à elle seule le coût du congrès, compte tenu du niveau de qualité et du nombre de spectacles.

Et, au moins, le programme des soirées est unique et ne vous oblige pas à faire des choix, comme c'est le cas pour le programme des journées, toujours bien trop riche pour tout suivre... Une dizaine de réunions, excursions, ateliers ou autres projections sont organisés en même temps tout au long de la semaine... sauf le mercredi, traditionnel jour des excursions.

Celles-ci sont proposées par l'UEA, pour une dizaine de destinations au choix, ou peuvent être organisées indépendamment par tout un chacun s'il le préfère, seul ou en groupe, compte tenu du patrimoine diversifié de Montréal, réparti dans des quartiers avec chacun leur atmosphère, et ses nombreux musées. La journée des excursions est à la fois l'occasion de sortir un peu du lieu de congrès, pour découvrir les environs tout en continuant à profiter de cette atmosphère amicale internationale unique grâce aux échanges en espéranto avec les autres visiteurs. Cela en fait une journée particulièrement appréciée de ceux qui n'ont pas pu venir plus tôt ou qui ne peuvent pas prolonger leur séjour.

Il y en a pour tous les goûts et tous les âges

Lors de la cérémonie de clôture, les enfants et adolescents qui ont participé au congrès des enfants sont montés sur scène pour saluer tous les participants présents. Une occasion de rappeler qu'un programme spécifique leur est dédié, adapté à leur âge, dans un endroit séparé, afin de leur permettre de progresser ou de pratiquer l'espéranto tout en soulageant les parents qui peuvent eux aussi suivre le programme de leur choix.

Mais les jeunes adultes ont pu eux aussi participer au « junulara programo » avec des sorties et des soirées pour se retrouver entre eux. Le reste du temps, les jeunes étaient nombreux à fréquenter l'Université où se tenait le congrès et ont ainsi largement rajeuni son image. Parmi eux, plusieurs Canadiens et Étasuniens, nombreux à avoir démarré l'apprentissage de l'espéranto depuis 2019, participaient pour la première fois à une rencontre d'espéranto. Le niveau de participation était tel qu'un congrès étasunien a aussi été organisé au sein du congrès mondial pour redynamiser et réorganiser le mouvement de ce pays.

Ce fut en fin de compte une belle réussite...

... surtout dans un contexte international tendu avec des règles et restrictions sanitaires changeantes, une hausse généralisée des prix et des liaisons aériennes encore partiellement désorganisées. Ce succès peut être mis au crédit de l'équipe locale d'organisation qui a fait le plus gros du travail, mais aussi de la nouvelle équipe de [E@I](#), menée par Peter Baláž, dont c'était la première expérience en tant que sous-traitant de l'UEA.

Bruno Flochon

Nia unua UK

Ĉu reala (fizika, ne reta) internacia kongreso ne estus la vera enirejo al la Esperanto-movado? Tio estas nia sento post partopreno en la UK 2022 en Montrealo.

Post du jaroj de pandemio, ĉiuj timis, ke denove ĉi-jare fizika renkontiĝo ne okazos, sed mirakle, ĝi okazis, por nia granda plezuro. Ni povas imagi la plurmonatajn grandegajn streĉojn por la organizantoj. Finfine la Universala Esperanta Asocio, apoganta sin sur tre vigla grupo de esperantistoj en Kebekio, sukcesis fari grandan eventon, kiu restos longe en nia memoro kaj en tiu de ĉiuj partoprenantoj. Bedaŭrinde, pro kialoj rilataj al la konsekvencoj de la nunaj mondskalaj krizoj, ne ĉiuj el la pli ol 800 aliĝintoj sukcesis veni al Montrealo.

En tiu artikolo ni ne ripetos informojn, kiujn oni povas facile trovi sur la reto (<https://uea.org/kongresoj>) sed ni faros nur kelkajn rimarkojn specifajn al la novuloj, kiujn ni estis. Tiu kongreso estis por ni ekzakte kia ni esperis: escepta semajno plena de renkontoj, de interesaj diskutoj kun scivolemaj homoj, de lernado pri la Esperanta movado kaj pri Kanado, de vizitoj al interesaj ejoj en aŭ ĉirkaŭ Montrealo, de artaj prezentaĵoj en bela kaj komforta teatro. Por iuj, kiuj estis ĉiamuloj de internaciaj sciencaj kongresoj kiel unu el ni, UK 2022 havas nenion por envii al aliaj grandaj internaciaj konferencoj. Unue ĝi okazis en UQAM, granda universitato, bone ekipita por ricevi tiajn eventojn. La sesioj, en kiuj ni partoprenis, kaj verŝajne la aliaj, estis profesie gviditaj de spertuloj, kun helpo de lokaj volontuloj, kiuj zorgis pri la teknikaj aspektoj, tre gravaj por multe da sesioj kiuj estis rete videblaj.

Unu demando, kiun ni havis antaŭ ol iri al Montrealo, estas la jena: ĉu Esperanta UK tute similas al tradiciaj spertaj kongresoj? La respondo estas jes kaj ne.

Kiel UK similas al aliaj fakaj kongresoj?

- Disponeblas antaŭ la evento detala libreto por prezenti ĉiujn programerojn, ebligante la partoprenantojn organizi sian semajnon. En tiu UK, unuafoje saĝtelefona aplikaĵo estis proponita; ĝi estis tre utila kaj efika.
- En ambaŭ kazoj okazas deko da paralelaj sesioj en sufiĉe proksimaj ĉambroj, por ke oni povu facile iri de unu programero al alia, iun ajn momenton.
- Ĉiu sesio estas gvidata de fakulo en la koncerna areo. Li aŭ ŝi organizas la interŝanĝojn, certigas, ke la daŭro de la interveno estas respektata kaj estas helpata de fakuloj pri teknikaj problemoj.

Kiel UK malsimilas?

- La listo de krom-aktivaĵoj, kiuj ebligas la partoprenantojn konatiĝi kun la gastiganta urbo kaj la listo de ŝatokupoj kiel vesperkoncertoj, estas pli granda ol dum kutimaj, profesiaj kongresoj.



Granda kaj komforta teatro por solenaj kunvenoj kaj koncertoj (El al foto-albumo UK2022)



10 ĉambroj de diversaj ampleksoj por studado. (El al foto-albumo UK2022)

- La amplekso de temoj de la programo estas multe pli vasta ol por aliaj kongresoj. Tio ne estas surpriza ĉar Esperanto estas nur ilo de internacia komunikado inter scivolemaj kaj toleremaj homoj. Efektive en UK 2022 ĉiu povis trovi ion interesan por si por aŭskulti aŭ diskuti.

Granda diferenco estas ke la nocio de konkuro ne ludas grandan rolon en UK, kiam en tradiciaj konferencoj ĉiuj volus havi la plej valoran aŭ gravan rezulton por sia esploro aŭ laboro.

Taŭgaj lokoj por ĉiuj aktivaĵoj

Montrealo estas granda universitata urbo. Nesurprize, la organizantoj elektis lokojn en universitato. La kongreso okazis en tri diversaj lokoj:

- Universitato de Kebekio (UQAM) por la stud-sesioj
- Granda teatro por la solenaj kunvenoj kaj koncertoj
- Apuda hotelo por la bankedo kaj balo.

Por manĝi estis kafejo surloke kaj multe da diversaj manĝlokoj en la proksimeco.

Laŭ nia vidpunkto, la praktikaj kondiĉoj por tiu UK estis tre bonaj. Unu minuso povas esti la altaj prezoj por loĝi en tiu parto de la urbo. Sed estis facile trovi malpli kostan loĝlokon en distanco de duonhorso per publika transporto, tion ni faris.

UK 2022: amaso da agadoj kaj temoj por ĉiuj gustoj kaj profiloj

La ĉi-jara UK havis kiel ĉefan temon: *Jardeko de Indigenaj Lingvoj*. Mark Fettes, antaŭa prezidanto de UEA, estis la reĝisoro de la temo. Dum la semajno, multe da sesioj kaj eventoj rilatis al lingvoj ĝenerale, kaj indigenaj lingvoj kaj kulturoj precipe.

Kelkaj membroj de kanadaj indigenaj grupoj partoprenis en la rilataj sesioj kaj riĉigis la vesperajn koncertojn. Ankaŭ ekstere, proksime de la kongresa loko, okazis ekspozicioj kaj publikaj koncertoj fare de diversaj kanadaj indigenoj. Bedaŭrinde ni ne sukcesis ĉeesti iun arangon de tiu festivalo. Tiom da prelegoj, eventoj kaj agadoj nin entuziasmigis, sed kompreneble ni devis elekti nur kelkajn pro manko de tempo, kvankam multaj aliaj estis tre allogaj.

Mallongaj filmoj tradukitaj en Esperanton estis proponitaj. Interesaj kaj kortuŝaj, ili donis parolon al indigenaj homoj el diversaj nacioj. La kongreso honoris la faman montrealan poeton kaj komponiston Leonard Cohen per filmo, kiu montras lin kiel junan viron en sia hejmurbo. Bona komplemento estis la eblo malkovri la multnombrajn verkojn en Esperanto aŭ librojn pri la lingvo kaj la movado dank' al la libroservo.

Lingvaj problemoj

Kompreneble la organizantoj proponis dekon da prelegoj pri Kanado. Krom pri historio, tiuj prelegoj temis pri lingvaj problemoj en Kebekio.

Ankaŭ lingvaj problemoj en Belgio estis prezentitaj. Aŭskultante tiujn prelegojn, ni multe lernis pri malfacilaĵoj en multlingvaj landoj.

Verkado kaj literaturaj konkursoj

Okazis dum la kongreso anonco de la premiitoj de la Interkultura Novelo-Konkurso kaj legado de ecoj de iliaj verkoj. Estis precipe interese konstati ke tiom da homoj, inter ili multe da junuloj, ŝatas verki en Esperanto. Ni ĝojis havi eblon renkonti ilin dank' al UK.

La Internacia Kongresa Universitato (IKU)

Ĉi-jare UK enhavis la 75an sesion de IKU. Ĝi estas unu el la plej popularaj kaj prestiĝaj programeroj de la kongreso. Sep faku-

loj prelegis pri diversaj temoj kiel astronomio, ĥemio de akvo-purigado, petrofiziko, ekonomiko, medicino. Krome, ekde 2015 estis aldonita Scienca Kafejo. Dum du sesioj ok spertuloj prelegas pri popularaj sciencaj aŭ teknikaj temoj. En Montrealo la temoj rilatis al matematiko, fiziko, lingvistiko, geologio. Ĉiuj prelegoj estis kompletigitaj per artikoloj aperintaj en libro eldonita en papera formo. La libro estas aĉetebla sur la UEA retejo.

Kursoj kaj ekzamenoj

Ni multe aprezis kelkajn el la viglaj kursoj de Sylvain Lelarge, kiu tre lerte instigas interagojn inter la partoprenantoj. Dediĉi tempon al la preparado kaj trapaso de KER-ekzameno organizita de Katalin Kovács estus utila, sed kiel unuafojaj kongresanoj ni elektis malkovri kiel eble plej multajn programerojn.

Solenaj kaj distraj partoj

La distra parto de la programo estis precipe sukcesa. La membroj de kebekiaj kluboj aktive partoprenis, ne nur en la organizado sed ankaŭ en la partopreno de la spektakloj.

Folkloraj dancoj, kantistoj, ĥoranoj, muzikistoj ludante pianon aŭ violonon, banĝon, tamburon, allogis la publikon. Alia surprizo estis la spektaklo Stelmani, la fama rok-opero, kiun Gijom' Armide adaptis.

Dum la solena fermo, kortuŝa estis la danko esprimita de la UEA-prezidanto al la diligenta loka teamo. Kaj kiel bona ideo de la ĥoruso omaĝi al Leonard Cohen, kantante Haleluja por la grandega plezuro de la tuta publiko.

Konkludo

Esperanta Universala Kongreso estas profesie organizita tutmonda evento. La proponitaj prelegoj kaj diskutoj havas tre altan kvaliton. La diverseco de temoj, la granda nombro de aktivaĵoj faras, ke ĉiu esperantisto havanta meznivelan konon de la lingvo povas partopreni kaj tiel havi esceptan semajnon por memorigi. Espereble, venontjara eldono en Torino, Italujo, ebligos al multe pli da partoprenantoj ĝui la eventon kaj trovi tie multe da kialoj daŭrigi siajn Esperantajn aktivaĵojn.

Laure kaj Joel, novbakitaj en la movado



La ĥoro, direktita de Zdravka, ofertis belegajn kantojn kaj Gary Evans, la kasisto de la kongreso, estis majesta en la rolo de Sinjoro Mann kiu parolas pri la vojaĝo de L. L. Zamenhof al Ameriko. (El al foto-albumo UK2022)

Langue, vie, terre : une décennie des langues autochtones

Le thème central du congrès de Montréal a été choisi en référence à la Décennie des langues autochtones, 2022-2023, décidée par l'ONU et l'UNESCO.

Pour les espérantistes, ce thème est un encouragement car nous sommes en terrain connu : notre mouvement regarde en général avec beaucoup de sympathie les luttes des minorités pour conserver leur langue, en France et ailleurs. Il est à noter que le recensement de toutes ces langues à l'échelle mondiale n'est pas terminé. Si beaucoup avaient retenu le chiffre de 7 000 langues, la dernière Conférence générale de l'UNESCO, en novembre 2021, en recensait environ 8 000.

Notre congrès a donc abordé ce thème, mais il est loin de l'avoir épuisé. Soulignons d'entrée le travail remarquable de Marc Fettes, ancien président de l'UEA, qui s'intéresse depuis longtemps à ce sujet, à partir de l'Ouest canadien où il demeure, et qui avait préparé une série de conférences pour le congrès et invité plusieurs spécialistes.

Ainsi, le linguiste Paul Hopkins a montré quelques-uns des grands traits des groupes de langues d'Amérique du Nord. Daniel Stoltzfus a donné plusieurs cours d'anichinabé (langue algonquienne). Une session a porté sur la Déclaration de l'ONU sur les droits des peuples autochtones et sur l'indissociabilité entre les droits linguistiques et les droits à la terre.

Très impressionnant, Jaboti' Potigvara, jeune indien tupi du Brésil, paré de ses plus belles plumes, a parlé des problèmes et des perspectives de certaines nations du Brésil, accompagné d'une universitaire, Ingrýd Machado de Oliveira, qui a montré la manière dont ces cultures étaient présentes et parfois déformées dans la littérature brésilienne.

Manuela Burghilea a parlé du Chéquo-Brésilien Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957), pionnier des recherches sur les langues autochtones. Enfin le congrès a accueilli le journaliste Steve Bonspiel qui a raconté l'histoire de sa communauté kahwanake, proche de Montréal, et de sa lutte permanente pour garder sa langue.

Ces conférences, un peu décalées, n'ont fait, encore une fois, qu'effleurer le sujet, mais elles ont débouché sur une résolution finale du congrès (voir page suivante).

Des langues liées à l'écologie locale

L'ensemble de ces présentations étaient intéressantes, même s'il était difficile de les suivre toutes, mais on pourrait penser qu'elles n'étaient, d'une certaine manière, que la prolongation d'une activité traditionnelle dans les congrès.



UK 2022 estis okazita por multe lerni pri la lingvoj kaj kulturoj de Indigenaj grupoj de Kanado kaj aliaj landoj. Gustavo, membro de la TUPÍ komunumo de Brazilo, tre aktive partoprenis la kongreson. (El la foto-albumo UK2022)

Et pourtant, il en ressort que les langues autochtones ne sont pas seulement des langues comme les autres. Les peuples autochtones insistent pour dire que leurs langues appartiennent à la terre sur laquelle elles sont nées, que les sons, les mots et les moyens d'expression de chaque langue sont profondément liés à l'écologie locale et que la langue ne peut vivre pleinement si elle est séparée de la vie des bêtes, des plantes, des rochers, des eaux et des vents.

En ce sens, on peut voir les langues autochtones comme un complément à l'espéranto. Celui-ci fonctionne bien comme langue internationale, sans lien spécifique à des lieux ou des cultures particulières. Mais s'il veut jouer un rôle pour un «monde durable», ce doit être un monde où les humains cultivent les relations non seulement entre eux, mais aussi avec les lieux où ils vivent et tous ceux, même non humains, qui s'y trouvent – et les langues indigènes sont justement les produits et les intermédiaires de ces cultures.

En conclusion, Marc Fettes est parti des 10 objectifs du plan d'action de l'UNESCO (https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000379851_fre - page 13) qui inclut bien sûr l'apprentissage de ces langues, mais aussi bien plus : leur utilisation pour maintenir l'intégrité de leurs systèmes alimentaires ; l'instauration de conditions propices à la liberté d'expression, à l'accès à l'information dans les langues autochtones ; la reconnaissance des systèmes de santé traditionnels ; l'instauration de l'égalité entre les sexes, etc. Ces objectifs montrent bien que la défense des langues ne peut fonctionner que si elle s'accompagne du bien-être de ses locuteurs.

Tout cela ouvre à notre mouvement des horizons nouveaux, pas forcément évidents : comment lier la lutte pour la défense des langues minoritaires avec celle pour la langue internationale espéranto ? Cette liaison se fait déjà en grande partie à l'ONU où des espérantistes sont à la pointe de la défense du multilinguisme : le 18 mai dernier, un « comité linguistique » non gouvernemental y a été créé, présidé par un espérantiste, Francis Hult. C'est un exemple qu'il faut soutenir et faire connaître.

Gilles Tabard

REZOLUCIO

de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo

La 859 partoprenantoj de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Montrealo, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022, traktis la kadran temon *Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj*. Per teritoria agnosko en la malferma ceremonio de la Kongreso, ni esprimis nian profundan dankon al la diversaj indiĝenaj nacioj, unuavice la ganjenka popolo (Kanien'kehá:ka, Mohawk), kiuj neniam cedis siajn rajtojn je tiu teritorio, kie ni kunvenis.

Per prelegoj, filmoj, diskutrondoj, kaj ankaŭ lingvokurso pri la aniŝinabeka, ni lernis pri la granda diverseco de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj en Nord-Ameriko kaj tutmonde. Ni konstatis, ke indiĝenaj popoloj ludas gravan rolon en la konservado de naturaj resursoj kaj biologia diverseco, kaj estas portantoj de fundamentaj scioj por nia daŭripova ekzisto sur la Tero. Ni krome aŭdis kiel, malgraŭ multaj baroj kaj atakoj al iliaj rajtoj, tiuj popoloj organiziĝas por daŭre plenumi siajn tradiciajn okupojn, konservi siajn kulturajn praktikojn kaj aserti siajn rajtojn je siaj teroj.

Honore al la komenco de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), nia Kongreso eldonis novan tradukon en Esperanto de la *Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj* pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Inter la multaj rajtoj agnoskitaj en tiu dokumento, ni aparte atentigas pri Artikolo 13, laŭ kiu "Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, buŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj." Kiel movado por lingvaj rajtoj, ni esprimas nian fortan subtenon al tiuj principoj.

La parolantoj de Esperanto alte taksas la valoron de kultura kaj lingva diverseco kaj kunlaboras por realigi lingvan demokration en monda skalo. Konforme al tiuj celoj kaj al la informoj kaj ideoj pritraktitaj en ĉi tiu Kongreso, ni deklaras nian solidarecon kaj subtenon al indiĝenaj popoloj en ties streboj por memdetermino, paco, justeco, kaj interkompreniĝo.



Du 24 au 27 novembre, le Congrès de Montréal se prolongera par un **Congrès virtuel**, en même temps que **Retoso**, événement organisé par les jeunes de TEJO.
Renseignements sur <https://vk.esperanto.net>.

RÉSOLUTION

du 107^e Congrès mondial d'espéranto à Montréal

Les 859 participants du 107^e Congrès mondial d'espéranto, réunis à Montréal, Canada, du 6 au 13 août 2022, ont abordé le thème-cadre *Langue, vie, terre : une décennie des langues autochtones*. Par une reconnaissance territoriale lors de la cérémonie d'ouverture du Congrès, nous avons exprimé notre profonde gratitude aux différentes nations autochtones, principalement le peuple Ganjenka (Kanien'kehá:ka, mohawk), qui n'a jamais renoncé à ses droits sur le territoire où nous nous sommes réunis.

Au travers de conférences, de films, de groupes de discussion, et aussi un cours de langue sur l'anichinabé, nous avons découvert la grande diversité des langues et des cultures autochtones en Amérique du Nord et dans le monde. Nous avons réalisé que les peuples autochtones jouent un rôle important dans la conservation des ressources naturelles et de la diversité biologique, et sont porteurs de connaissances fondamentales pour notre existence durable sur Terre. Nous avons également entendu comment, malgré de nombreux obstacles et atteintes à leurs droits, ces peuples s'organisent pour continuer à exercer leurs activités traditionnelles, préserver leurs pratiques culturelles et faire valoir leurs droits sur leurs terres.

En l'honneur du début de la Décennie internationale des langues autochtones (2022-2032) décidée par l'ONU, notre Congrès a publié une nouvelle traduction en espéranto de la *Déclaration des Nations Unies* sur les droits des peuples autochtones. Parmi les nombreux droits reconnus dans ce document, nous attirons particulièrement l'attention sur l'article 13, selon lequel « les peuples autochtones ont le droit de faire revivre, d'utiliser, de développer et de transmettre aux générations futures leurs histoires, langues, traditions orales, philosophies, systèmes d'écriture et littératures, et de conserver leurs noms originaux pour les communautés, les lieux et les personnes ou de les nommer eux-mêmes. En tant que mouvement pour les droits linguistiques, nous exprimons notre ferme appui à ces principes.

Les locuteurs d'espéranto attachent une grande importance à la valeur de la diversité culturelle et linguistique et collaborent pour réaliser la démocratie linguistique à l'échelle mondiale. Conformément à ces objectifs et aux informations et idées discutées lors de ce Congrès, nous déclarons notre solidarité et notre soutien aux peuples autochtones dans leurs aspirations à l'autodétermination, la paix, la justice et la compréhension mutuelle.

Sukcesa nacia Esperanto-kongreso 2022: novuloj atestas

Du membroj de la strasburga grupo malkovris unuafoje la specialan etoson de tutlanda Esperanta kunveno kaj donas siajn impresojn. Ĵoel estis esploristo kaj instruisto pri fiziko kaj esperantistiĝis en 2018. Li lernis la abocon de la lingvo dank' al ikurso, kiun li malkovris en la retejo de Espéranto-France, kaj al staĝoj en Greziljono.

Laure instruis la francan kaj esperantistiĝis en 2019. Ŝi lernis dank' al Duolingo kaj la staĝoj de Greziljono.

Ambaŭ partoprenis en la viglaj kursoj de Bernard Pidancier, la loka strasburga instruisto.

Estas bedaŭrinde, ke oni povas travivi tutan akademian karieron sen esti konscia, ke ekzistas mirinda kaj efika ilo por internaciaj interŝanĝoj. Kiel ekspliki, ke ni malkovris la potencon efikecon de Esperanto tiel malfrue, nur kiam la tempo por ripozi alvenis?

Unu kialo certe estas, ke dum la jarcento kaj duono de ekzistado de la “facila kaj justa lingvo”, multaj naciaj obstakloj leviĝis por bari tiun “danĝeran lingvon” laŭ la vidpunkto de naciaj registaroj, por kiuj la nacia lingvo estas armilo por kontraŭi la barbarojn, kiuj parolas aliajn strangajn lingvojn! Disvolvi komunan lingvon, kiu povus helpi ĉiujn homojn interkompreni kaj amikiĝi, ne estas bona ideo por “naciistoj”. Finfine la ekonomia leĝo iĝis la plej forta... kaj nun regas la angla.

Tion ne volas akcepti malgranda minoritato de la mondo, la esperantistoj. Ni nun apartenas al tiu minoritato kaj ĝuis antaŭ nelonge la fervoran etoson de la Esperanta movado dum la ĵus okazinta franca Esperanto-kongreso en Trélissac, Perigordo. Por la novuloj kiuj ni estas, estis emocia evento, ĉar ni konis la



Ni lernis, ĉiumaniere.

komunumon ĉefe per retaj eventoj, iomete per kelkaj fizikaj renkontiĝoj antaŭ la pandemio.

La evento estis profesie organizita de la loka grupo de esperantistoj. Antaŭ kaj dum la kongreso, la teamo aperis kiel tre dinamika por la respondo al demandoj kaj helpopetoj. Evidente multaj membroj de la perigorda kaj nacia komunumoj, sub la gvido de la nacia prezidanto, kiun ni bonŝance ofte renkontas en Strasburgo, aktive partoprenis en la preparado kaj funkciado.

La loko en Trélissac, apud Perigozo (Périgueux), estis tute taŭga. Estis multe da spaco en la sociokultura centro por kunvenoj de grandaj kaj malgrandaj grupoj. Ĉiuj partoj de la programo disvolviĝis glate. La listo de aktivaĵoj ofertaj dum la kvar tagoj inkluzivis precize kion ni imagis: konatiĝi kun la membroj de aliaj asocioj el la

diversaj regionoj, plibonigi niajn sciojn pri la lingvo, lerni pri la lokaj mirindaĵoj.

Estis bona ekvilibro inter la diversaj informoj kiujn ni ricevis: pri la lokaj iniciatoj, pri tio kio okazas landnivele, pri la internaciaj eventoj. Tre interese estis malkovri la riĉecojn de la perigorda regiono, kiun homoj okupis dum miloj da jaroj, kiel atestas la belaj pentraĵoj de Lascaux, kiun ni vizitis unuafoje. Grandaj momentoj estis ankaŭ la retaj interŝanĝoj kun la prezidanto de la

Universala Esperanta Asocio, Duncan Charters, kiun la kronviruso malebligis partopreni fizike. Feliĉe, la ĝenerala sekretario de UEA, Aleks Kadar ĉeestis fizike, tio donis al ni okazon paroli kun li. Por la progresantoj kiuj ni estas, estis aparte alloga pasigi tempon kun Katalin Kovács kaj Sylvain Lelarge kiuj, tiel pasie, strebas al la progreso de la lingva kono kaj parolesprimo per preparado de KER-ekzamenoj. Ne multaj eksterlandanoj venis al Trélissac, tamen kelkaj. La malfacileco vojaĝi dum postpandemiaj tempoj estis certe la kialo. Malgraŭ tio, la partoprenantoj ne multe krokodilis. Tion ni ŝatis ĉar ni venis ankaŭ por plibonigi nian parolkapablon. Fine, estis aparte granda plezuro aŭskulti kanzonojn de Brassens en Esperanto kaj la diversajn muzikaĵojn de JoMo, kiu vigle dancigis la publikon.

Unuvorte, la 2022-Kongreso de Esperanto en Perigordo, kun sia agrabla etoso kaj bunta enhavo, restos granda etapo de nia eniro en la Esperantan movadon.

Joël Fontaine kaj Laure Wolff



maldekstre dekstren: Bruno Flochon, Laure Wolff kaj Joël Fontaine

Intervjuo kun **Said Baluĉi**, deĵoranto en la sidejo de **Espéranto-France**

Kiam vi komencis labori por Espéranto-France?

Oficiale ekde la unua de januaro 2022! Tamen antaŭ tio mi kunlaboris diversspece, partoprenis aranĝojn, prelegis en la sidejo ktp. Dum unu el tiuj vizitoj de Marjan kaj mi al la Sidejo, Suzana, la antaŭa respondeculo kiu post longa tempo de laboro – laŭ mia memoro 17 jarojn – estis sojle de la emeritiĝo, demandis min ĉu mi volus labori ĉe Espéranto-France? Kaj mi jesis. Ŝi proponis min al la estraro kaj la estraro, post la koncernaj oficialaĵoj, konsentis.

Kio estas via unua impresoj post tiu nova posteno en Francio?

Kompreneble kontenteco. De 2018 mi laboris ĉe UEA sed post 2021 ne plu eblis plentempe labori tie kaj mi ne volis resti sen laboro. Ĉi tie, en la sidejo, post pli ol unu monato de la kunlaboro kun Suzana, mi trovas min hejme. Tio estas ke la laboro ne estas fremda al mi. Mi vere dankas ŝin kaj aliajn volontulojn kaj helpantojn. Parizo entute pli similas al Tehrano ol Roterdamo.

Kion vi faris antaŭe?

Ĝis 2013 mi loĝis en Tehrano. Mia lasta laboro tie estis instrui persajn lingvon kaj literaturon en kelkaj tehranaj universitatoj. Sed antaŭ ol fariĝi universitata docento, por lukri mian monon por la vivteno kaj por la studado, mi laboris kiel kontisto kaj administristo.

Ĉu vi pensas, ke Esperanto progresas en la mondo ?

Ne! Esperanto aŭ io simila. Sed ĝis nun oni ne sukcesis inventi pli bonan ol Esperanto. La homaro ne havas alian opcion ol elekti/inventi internacian lingvon. La historio montras ke neniu internaciiginta nacia lingvo restis internacia poreterne. Lingvoj kiel la (malnov)persa, araba, rusa, franca, angla, ktp. kelkiam rolis/as kiel internacia lingvo aŭ Lingvafrankao sed finfine donis/as sian rolon al alia lingvo, ĉar ĝis nun la internacia lingvo estis/as tiu lingvo kiu havis/as pli fortan armeon. Se la historio marŝos en la sama itinero, baldaŭ ni ĉiuj devos lerni la ĉinan. Sed mi opinias ke tie ekzistas fortika ĉina muro. Konscii pri la lingvoproblemo ne estas natura afero, estas eduka afero. Nuntempe la homoj pli kaj pli konscias pri la lingva problemo. Kaj la lingva problemo ne havas alian demokratian solvon ol iu neŭtrala, logika, nenacia lingvo. Kaj tio estas – almenaŭ ĝis nun – Esperanto. La pozicio de Esperanto en la interreto kaj ĉe la nova generacio certigas min ke Esperanto havas klaran estontecon.

Said kaj Susanna laborante en la sidejo



Kiel vi eklernis Esperanton?

Legante perslingvan libron de D^{ro} Saheb-Zamani mi vidis propagandon en ĝi pri Esperanto. Estis ĉirkaŭ la revolucio en Irano, 1979. Mi havis svagan bildon en la kapo ĝis post kelkaj jaroj. Ni, tri amikoj kune aĉetis mem-lerno-libron. La aliaj du amikoj rezignis lerni kaj donis la libron al mi. Post kelkaj monatoj mi kapablis korespondi. Estis 1984 aŭ 1985. Mia unua letero estis al tiama Ĉeĥoslovakio, al sinjorino Dagmar Knapova kiu jam bedaŭrinde mortis.

Kompreneble poste mi daŭrigis en la klasoj de Ĵila Sedigi, tiama ĉefdelegitino de UEA en Irano. Ŝi estis tre lerta esperantisto kaj instruisto. Ŝi multe helpis min ĝis miaj noveloj komencis aperi en Kontakto, ktp. Mia unua novelo aperis en Kontakto en januaro-februaro 1989.

Kio, laŭ vi, povus helpi al disvastigo de Esperanto?

Ideale estus se esperanto ricevus favoron ĉe la politiko aŭ enirus la lernejojn. Ambaŭ terenoj restas tre sporade plugitaj de ni. Kvankam mi komprenas ke ne ĉio dependas de nia volo.

Sed reale, mi povus diri ke ni ĉiuj faru kion ni povas. Ĉiu esperantisto en sia tereno uzu Esperanton laŭeble. Ekde mia junaĝo, kiu ajn konis/as min, tuj asocias min kun Esperanto. Tio signifas ke mi ne hontis esti esperantisto! Dum mia studado, kiam ajn eblis, mi elektis studtemon rilatan al Esperanto. Mia magistriĝa tezo estis traduko de persaj prozoj kaj poemoj al Esperanto. Jes, ne estas facila persvadi klasikan universitaton akcepti tezon rilate al Esperanto. Tamen mi sukcesis.

Alia mia peto estas, ke esperantistoj plej unue mem lernu la lingvon kaj bone parolu ĝin. Balbuti Esperanton sed fanfaroni per ĝi donas negativan rezulton. Regi Esperanton dependas de bona lernado kaj aplikado. La fenomeno “lernado” neniam estas “facila”.



Kaj la rolo de Espéranto-France?

Historian kaj nuntempan! Historie Francio spertis tempon kiam ĝia lingvo estis internacia, interŝtata, lingvafrankao kaj en multaj landoj, inter ili mia devena lando Irano, eĉ deviga dua lingvo en altlernejoj kaj universitatoj. Eĉ ankoraŭ la franca estas parolata en pluraj landoj.

Francoj ĝenerale estas konsciaj pri la lingvoproblemo. Nuntempe rolo de Francio estas defendi sian bildon kiel landon de demokratio. Kaj nenia demokratio estas kompleta sen la lingva demokratio.

Ĉu vi havas tempon por esplori la Esperantan kulturon? Se jes, kion vi konsilus por legi aŭ spekti?

Post la eldono de mia dua libro *Antologia skizo de la persa literaturo* min atingis reagoj surbaze de kiuj mi sentas bezonon fari pluajn paŝojn. Ekzemple fari pli bonan vortaron, aldoni fragmentojn kiuj mankas en la eldonita libro, verki pri/traduki el poetoj/aŭtoroj kiuj en la oficialaj universitataj lernolibroj estas

prisilentitaj, ktp. Se intertempe restas tempo, min interesas literaturaj antologioj de aliaj lingvoj, el kiuj mi kolektis plurajn. Hejme, kun Marjan, ni parolas Esperante, ofte pri niaj komunaj temoj. Ni ambaŭ verkas/tradukas kaj tio estas foje nia paroltemo. Esperanta kulturo efektive estas transkulturo kiu devas bazi sin sur transliteraturo kaj tiu ĉi dependas de certa kvanto de legantoj kaj literaturaĵoj. Laŭ mi ambaŭ devas ankoraŭ proviziĝi per plia kvanto.

Alia informo aŭ rimarko por konkludi?

Esperanto apartenas al la lokomotivoj, ne al la vagonoj. Esperanto ne estas afero de sekvi, atendi ke "oni" faru! "Oni" devas agi mem. Ni devas fari. Ni esperantistoj! Ĉiu laŭ sia kapablo.

Koran dankon pro via laboro kaj tiu ĉi interŝanĝo.

Plezure,
Said Baluĉi

Ĥoj de la estraro de Espéranto-France

La 28-an de majo, okaze de la membrokunveno, kiu okazis en la kongreso de Trélissac, parto de la komitato estis renovigita.

Kvar membroj estis elektitaj aŭ reelektitaj por reprezenti la membrojn: Bruno Flochon, Aleks Kadar, Michaël-Boris Mandirola, Emmanuelle Richard.

La komitato unue kunvenis la saman tagon kaj elektis la estraron:

Prezidanto: Bruno Flochon

Kasisto: Paul Quevy-Lefevre

Vikasisto: Jean-Lucien Mazeau

Sekretario: Emmanuelle Richard

Estrarano: Gilles Tabard

La tuta listo de komitatanoj troviĝas ĉe <https://esperanto-france.org/administration>

La lumbildaro prezentita dum la membrokunveno, kaj la jara raporto kaj financa raporto troviĝas ĉe: <https://esperanto-france.org/assemblee-generale-2022>

Abonnements 2023

Revue	Nombre de n° par an	Prix
Esperanto (revue de UEA)	11 n°	45,00 €
Heroldo – édition grâce aux dons	12 n°	gratuit
Juna Amiko (revue interscolaire)	4 n°	18,00 €
plus de 3 ex. à la même adresse		15,00 €
membre de ILEI abonné à IPR (papier)		15,00 €
par Internet		11,00 €
La Kancerkliniko	5 n°	27,50 €
voie aérienne		28,50 €
Kontakto	6 n°	25,00 €
La Ondo	4 n°	
par Internet		15,00 €
abonnement « ami »		30,00 €
Le Monde de l'Espéranto (bilingue) – édition grâce aux dons	4 n°	
tarif numérique (envoi courriel)		gratuit
tarif international		30,00 €
Literatura Foiro	6 n°	56,00 €
Monato (magazine international) voie terrestre	11 n°	65,00 €
voie aérienne		68,00 €
par Internet		36,40 €
IPR Internacia Pedagogia Revuo	4 n°	30,00 €
(Les membres de ILEI bénéficient d'un tarif préférentiel)		
par Internet		12,50 €
Unesko Kuriero (1 jaro)	4 n°	70,00 €
Unesko Kuriero (2 jaroj)	8 n°	140,00 €



Claude, amikino kaj esperantisto

Mi verŝajne estas inter vi la homo, kiu konas Claude Nourmont de pli da jaroj. Efektive ni konatiĝis, kiam ni ambaŭ estis studentinoj en Aix kaj niaj esperantistaj “karieroj” iel paralelas. Do pardonu se mi tro ofte parolas ankaŭ pri mi.

Esperanto pri scivolemo

La vivo de Claude enskribiĝis inter du militoj: ŝi naskiĝis apud Rouen fine de la dua mondmilito, en 1945, kaj ŝi rakontis, ke la urbo nun estas pli bela ol kiam ŝi estis infano: bombita kaj detruita. Sed Claude mortis pro cerbatako kiam komenciĝas milito en Ukrainio. Tiel la mondo iras.

Ŝi estis sola filino de maljunaj gepatroj, ambaŭ instruistoj. Sed de la infanaĝo Claude aŭdas paroli pri la internacia lingvo de la avo, en mezgrada lernejo, ŝi aŭskultas Ribot, fama esperantisto el Agen, kaj poste translokiĝas al Aix-en-Provence.

Tie ŝi bonŝance profitas la kurson de nelaciĝebla esperantisto Marcel Jullien, kiu instruas en la pedagogiaj seminarioj, la altlernejo Arts et Métiers kaj École militaire. Li informas pri vintra renkontiĝo en Adelboden (Svislando). Claude partoprenas en 1963 kaj 1964: kliko por fariĝi vera esperantisto. Renkonti junulojn, diskuti kun ili en Esperanto, ĝui la vivon, jen kio estos ŝia vivo.

Esperanto pro libereco

Esperanto permesos al ŝi libere vojaĝi, sen la gepatroj. Mi memoras telegramon de ŝia patrino al mi (ĉu en 64 en Den Hago?) “se Claude ne en kongreso, avertu policon”. Estis en la praa epoko, sen poŝtelefono, kaj supozeble Claude ne regule sendis poŝtkartojn!

Mi memoras ŝin sur kajo en iu stacidomo, ie en Eŭropo, kun amaso da sakoj kaj valizoj, kiujn ŝi sole ne povas porti kaj ŝi atendas (kaj trovas) bonvoleman helpanton! Sed ŝia patrino, Suzanne, estis tipa patrino de esperantisto, kiu akceptas eksterlandanojn, preparas manĝojn, lavas littukojn, ktp. (poste ŝi mem lernos Esperanton kaj partoprenos kongresojn).

Kaj, kiam ni kune kreas SERAM (Studenta Esperanto-Rondo de Aix-Marseille), la ĉambro de Claude iĝas la sidejo de la asocio, kie ni organizas la kongreson de STELO (Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo) en 1968. Imagu: la tuta antaŭmaja laboro fariĝas vana, necesas ĉion rekomenci (ekz. korekti la presitan invitilon ĉar ŝanĝiĝas la salono en la universitato; peti de partoprenantoj foton kaj legitimilon, en epoko, kiam ne estas reto... Imagu la laboron!

Jen ekzemplo de engaĝiĝo por Esperanto.

Esperanto pro idealo

Laŭ la slogano “esperanto – edzpesranto”, Claude konatiĝas kun Brian Moon (el Britio) en la 70-aj jaroj kaj edziniĝas en Aix en 1975. Ŝia atestanto estas la senlaca Marcel Jullien. Mi kun ŝi festos plurfoje la geedziĝon: en Aix, en Melun, kie ŝi instruas filozofion, kaj en Parizo kun esperantistoj (sed ne en Britio kun la familio de Brian).

Mi memoras anekdoton pri ŝia edziĝvesto: malhelblua kostumo, jupon ŝi aĉetis en Melun, veston en Parizo. Por ni, ŝi laboras en Parizo, sed kiam ŝi deziras aĉeti en Parizo, la vendistino diras “ja, en provinco...”).

Ĉar Brian laboras ĉe la eŭropaj instancoj, en Luksemburgo, ŝi petas postenon apud la landolimo kaj ricevas postenon en Thionville, en Lycée de la Briquerie. Ŝi emis rakonti la anekdoton, kiam lernanto petas de ŝi, kion ŝi opinias pri Esperanto, ŝi simple respondas “mi nenion opinias pri ĝi, mi ĝin parolas hejme”. Ŝi poste ricevas postenon en Lycée Charlemagne en Thionville kaj enposteniĝos kiel bibliotekistino. Mi bonŝancas, ĉar kiam en 80, mi ricevas postenon en la sama lernejo, ŝi helpas ne nur trovi loĝejon, (eĉ se pro alergia, ŝi suferas en farbvendejo), sed tuj prezentas min al siaj geamikoj, tiel ke mi ne sentas min fremda aŭ izolita.

Engaĝiĝo

Claude ne nur profitas de Esperanto por vojaĝi, eĉ se ŝi petos forpermeson por ĉirkaŭiri la mondon en 80-81, aŭ paroli kun la edzo, ŝi laŭ la jaroj transprenos respondecon en la movado; ŝi estos prezidanto de TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) de 1975 ĝis 1977, Ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto en 1973, poste prezidanto.

Mi memoras landan kongreson, ĉu en Tours, kiam membro de la LKK deklaras “ni estas veteranoj, ni ne obeu knabinaĉojn”, forgesante, ke la “knabinaĉoj” estas prezidanto (mi) kaj ĝenerala sekretario (ŝi) de la asocio. Dum pluraj jaroj ŝi estas Komitatano-A de UEA, tio signifas, ke ŝi reprezentas Francion en la internacia asocio, sed ĉefe, ke anstataŭ ĝui la kongreson aŭ la kongresurbon, ŝi sidas dum horoj

en kunsidoj! Ĉiuj elstarigas ŝian kapablon ne nur labori sed harmonie laborigi la homojn, ekz. kiam ŝi prezidas la LKKon por organizi la universalan kongreson en Montpellier en 1998.

Esperanto por kulturo

En 2004, ŝi fariĝas vic-prezidanto de UEA pri kulturo, posteno, kiun ŝi okupos ĝis 2013, sed male al mi, kiu havis la saman postenon pli frue, ŝi plu laboros por kulturo ĉe UEA, kunorganizante la Klerigajn lundojn dum la UK.

Peza laboro: trovi intervenantojn, kontakti ilin, kunordigi, ktp. Tion ŝi faris ankaŭ por la UK en Montrealo ĉi-jare. En julio 2003 ŝi fariĝas ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto*, kaj, en la revuo *Monato*, ŝi respondecas pri la rubriko "Arto" (mi ne diris, ke apud filozofio, ŝi ankaŭ diplomigis pri arto). Kun Brian, ili vivtenos la kulturan centron Kvinpetalo en Bouresse, ne nur finance, sed ankaŭ praktike: mi memoras sesion, kiam Claude mem kuiras por la partoprenantoj, same kiel ŝi kuiras hejme, do tute ne tipajn komunajn manĝojn.

Ne nur Esperanto

Eĉ se Esperanto plenigis grandan parton de ŝia vivo, ni ne forgesas, ke ŝi estis lerta gastigantino, kiu akceptis homojn ĉu en la kuirejo, ĉu en unu el la manĝoĉambroj, eĉ en la kelo aŭ la ĝardeno de ilia granda domo en Dalheim, ĉiam kun prilaborita manĝo.

Ŝi estas katamanto, kun multaj katoj (Brian kutimis kalkuli "unu, du, tro") kaj ekinteresiĝas pri genealogio denove antaŭ la tempo de la reto, do ŝi vojaĝas al diversaj vilaĝoj por trovi praulojn. Mi memoras ŝian ĝojon kiam ŝi trovas posteulon de kuzo de praprapatro kaj fiere anoncas "ni partoprenos la bapton de kuzeto" eĉ se ŝi ne estas kredanto kaj agas en ateista asocio (ni memoru ke la patro estis liberpensulo). Interese, malgraŭ granda partopreno en la Esperanto-movado, ŝi neniam verkis libron, lernolibron aŭ poeziaĵon, male al multaj komencantoj. Ni lasas al ŝi la lastan vorton "Kvankam mi ŝajne multon faris, mi ne faris sufiĉon". Ni ĉiuj same engaĝigu kaj produkti!

Renée Triolle

Prezento de Claude por la panteono de edukado.net

Pri Esperanto mi ekaŭdis kiam mi estis infano. Sed necesis multaj paŝoj, por ke ĝi vere plene eniru kaj invadu mian vivon.

Ĝis mia 16-a jaro mi loĝis en Sotteville-lès-Rouen, Francio, grava fervojista centro. Kiam mi estis tre juna, mia patro ŝatis promeni kun mi tra la stratoj de la urbo, kaj klarigi pri ilia nomo. Estis iu strato Zamenhof, pro siatempa forta fervojista Esperanto-movado tie. Kiam okazis tio, mi ne precize memoras, sed pri dua evento mi tre precize memoras.

Mi estis 9-jara kaj feris kun miaj gepatroj en iu familia hotelo, en la centro de Francio. Iun vesperon alia gasto de la hotelo montris turisman flugfolion de sia urbo. La dokumento estis en la franca kaj estis resumo en iu alia lingvo. La gasto petis de ĉeestantoj diveni, pri kiu lingvo temas. Neniu sciis.

Tiam li malkaŝis, ke temas pri Esperanto. Kaj mia patro tuj klarigis, ke temas pri lingvo, kiun ĉiuj povas kompreni. Lingvo kiun ĉiuj povas kompreni! Tio sparkis en mi kiel mirakla afero, kaj eĉ se mi ne tuj eklernis la lingvon, restis profunde en mi tiu ideo. Jarojn poste mi denove renkontiĝis kun Esperanto, kiam en la porinstruista seminario, kie mi studis, venis André Ribot, kies prelego pri Esperanto entuziasmigis la studentinojn. Preskaŭ ĉiuj aĉetis lian bazan lernolibron. Sed bedaŭrinde post lia prelego ne estis organizata kurso aŭ ajna kontakto kun esperantistoj, kaj la entuziasmo rapide falis. Mi klopodis mem lerni per tiu libro, sed sen kontaktoj mankis la motivado. Cetere mi estis plene okupita pro la studoj, kaj tio ne lasis tempon al lernado de io ekster la oficialaj programoj.

Du jarojn poste mi translokiĝis al Aix-en-Provence kaj tie mia patro klopodis starigi kontaktojn kun liberpensuloj. Hazarde unu el la unuaj homoj, kiujn li kontaktis estis S-ro Jullien, la prezidanto de la Esperanto-Asocio de la urbo! Tuj mi rakontis pri mia interesiĝo pri la lingvo. Mi tamen atendis ankoraŭ jaron por serioze lerni, ĉar mi devis nepre kaj unuavice sukcesi la abiturientan ekzamenon. S-ro Jullien parolis pri diversaj junuloj kiuj eklernis Esperanton kun li.

Foje mi iris al la loka klubo, sed tie estis ĉefe maljunuloj. Kiam mi ekis miajn universitatajn studojn, evidentiĝis ke pluraj esperantistoj studas en la sama universitato. Jen kuraĝigo! Sed plej trafe estis, kiam S-ro Jullien informis min pri esperantista renkontiĝo en Svislando dum la jarŝanĝo 1963-1964. Temis pri skiferio en Adelboden, organizita de Claude Gacond, kien mi iris kun alia studento, Esperantlingve multe pli sperta ol mi. Surloke mi konstatis, ke mi ne havas la nivelon de la aliaj partoprenantoj, sed la regulo estis: ne krokodili! Mi respektis ĝin (tiom ke iu partoprenanto kredis min preskaŭ malsane malbabilema...) kaj tio multe helpis min progresi.

La decida paŝo supozeble estis, ke dum tiu restado mi enamiĝis al svisa esperantisto (kiu nun duonkabeis) kaj ni poste korespondis, renkontiĝis... Kiam mi en julio iris al la UK en Hago, iu kutime tre kritikema persono diris ke en Adelboden mi estis balbutanto, sed ke nun mi parolas la lingvon kvazaŭ denaske! Kaj poste... Esperanto efektive fariĝis unu el la centraj aferoj en mia vivo.

Kiam mi estis studentino en Aix-en-Provence, estis kunfondita, kun i.a. Renée Triolle, Studenta Esperanto-Rondo en nia universitato. Ni tie sukcesis organizi kongreson de STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) en 1968. Plej grave, en 1969 mi sukcesis kun Michel Duc Goninaz akceptigi oficialan kurson de Esperanto en la Universitato de Aix-en-Provence, kiu okazis dum 25 jaroj.

Mi agis ankaŭ en TEJO, estis estrarano kaj poste prezidanto de 1975 ĝis 1977 kaj ekde 1978 mi estas honora prezidanto de TEJO. Ĉefa agado, kiun mi memoras, estas la klopodoj organizi serion da seminarioj "lingvo kaj" (kulturo, socio...) kun ne-esperantistaj junularaj organizoj. Kaj ankaŭ Semed (seminarioj ĉe Mediteraneo). Kaj laborgrupoj dum diversaj renkontiĝoj...

Post miaj studoj mi fariĝis instruistino pri filozofio, unue en liceo de pariza regiono. En 1975 mi edziniĝis kun Brian Moon, angla esperantisto, kiu tiam eklaboris en Luksemburgio, do mi serĉis postenon pli proksime al Luksemburgio. Bonŝance mi

ricevis postenon en liceo en Thionville, la plej proksima urbo.

En la kursoj pri filozofio oni instruas i.a. la nocion “lingvaĵo”. En tiu jaro mi havis tre scivoleman klason, kie la lernantoj ne hezitis fari demandojn. Subite iu levis la manon kaj demandis: “en la apuda liceo, la instruisto pri filozofio – kiu havas foje strangajn ideojn – parolis al siaj lernantoj pri iu internacia lingvo, temas pri Esperanto, kion vi opinias pri ĝi?” kaj mia respondo “Mi nenion opinias pri ĝi, mi parolas ĝin hejme” tiom logis ilin, ke mi devis promesi, ke en la venonta kurso mi dediĉos specialan horon por tiu lingvo. Kaj poste alia klaso ĵaluzis, kaj neprevolis ankaŭ scii pri tiu lingvo. Kaj ili petis ke mi gvidu kurson (ekster la oficiala programo, dum la tagmeza paŭzo). Mi tion faris. Tamen estis jam malfrue en la jaro, ĉiuj miaj lernantoj devis zorge prepari sin al abiturienta ekzameno. Sed eĉ se ili ne ellernis Esperanton, ili certe restis kun pozitiva impresio. La instruisto kiu parolis pri Esperanto al siaj lernantoj estas Eugène de Zilah sed mi ankoraŭ ne konis lin.

Poste mi ricevis postenon en alia liceo de la sama urbo, sed en alia fako: mi zorgis pri dokumenta centro/biblioteko. Kaj mi trovis la okazon por organizi ekspozicion pri Esperanto, kien venis la instruistoj kun siaj klasoj. Dum multaj jaroj instruis la rusan en la sama liceo Renée Triolle, kio helpis al la konigo de Esperanto en tuta Thionville kaj regiono.

Mi loĝas delonge en Luksemburgio, sed ĉar mi laboris en Francio, mi havis kaj plu havas grandan parton de mia socia vivo

en Francio. Tial mi plu estas komitatano de Espéranto-France (UFE: Unuiĝo Franca por Esperanto). La unuan fojon mi kandidatiĝis en 1968, kiam mi estis studentino. Mi estis elektita ĝenerala sekretario en 1973. Estis kelkaj paŭzoj. Dum 7 jaroj mi estis prezidanto de UFE. Nun mi estas komitatano A por Francio ĉe UEA. Mi taksas ke la plej grava laboro, kiun mi faris por UFE kaj por UEA, estas la prezidado de la LKK en Montpellier en 1998. Kiel partopreninto de multaj UK-oj, ekde 1964 en Hago, kiam mi ĵus lernis la lingvon kaj apenaŭ orientiĝis en tio, kio estas kongreso, kiom interese estis mem partopreni kiel konstruanto de la evento! Por la jubilea UK en Lille en 2015 mi havis malpli da respondecoj, sed tamen ne malpli da laboro: kunorganizo de la kulturaj prelegoj pri la lando, kunorganizo de la teatra parto de la arta programo, zorgado pri la ekspozicioj. Kaj la tuta organizo de la Kleriga Lundo!

En 2011-2013 mi partoprenis nome de UFE en Grundtvig-projekto, kun 3 aliaj asocioj: “Edukado al Interkulturo – defio por Eŭropo”. La projekto sukcesis, kaj estis kreita speciala retejo. Tiuj projektoj estas la prauloj de Erasmus+, kaj ricevas subvencion de EU.

Dum 9 jaroj mi estis vicprezidanto de UEA, estrarano pri edukado, kulturo, kongresoj (2004-2013). En la komenco de mia mandato, en 2005, mi kunorganizis simpozion pri la 100-jara sperto de Esperanto-renkontiĝoj en Boulogne-sur-Mer. Kaj poste mi rutine organizis kelkajn programerojn de la UK: Libro de la jaro, aŭtoraj duonhoraj...

Kion mi faras ankoraŭ nuntempe, kiu rilatas al klerigo en aŭ per Esperanto? Ekde julio 2003 mi estas ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto*, dulingva magazino, parte en la franca, parte en Esperanto. Mi estas ankaŭ redaktoro pri arto de la magazino *Monato*.

De kelkaj jaroj mi zorgas pri organizado de klerigaj/pedagogiaj kursoj en la kulturcentro Kvinpetalo (Bouresse, Francio): instruado de Esperanto je diversaj niveloj, tradukado, trejnado de instruontoj por gustumigi Esperanton en elementaj lernejoj kadre de TAP (eksterprogramaj aktivaj). Tie (kaj en aliaj lokoj) mi havis okazon esti ekzamenanto por ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto.

Kaj mi nun organizas la sesiojn de la Kleriga Lundo dum la UK-oj. Ne estas ĉiam facile. Multaj fakuloj proponas prelegojn, oni devas konvinki ilin, ke la programeroj de la Kleriga Lundo devas esti partoprenigaj, ke estu okazo por la homoj interveni. Ludoj, sportecaj sesioj, kantigo, k.s. estas aparte bonvenaj, same kiel diskutigaj prezentoj.

Unu el miaj revoj, kiam mi estis juna, estis vojaĝi tra la mondo, kaj i.a. pro tio mi lernis Esperanton. Tiun revon mi povis realigi en 1980-1981, kiam mi feris dum tuta jaro kaj migris tra la mondo, ĉefe renkontante esperantistajn grupojn. Tiel mi vizitis Japanion kaj Argentinon, kie mi prelegis en Esperanto. Ankaŭ Baraton kaj Brazilon. Meksikion kaj Usonon. Kaj multajn aliajn landojn.

Ĉie mi renkontis la gastemon de esperantistoj, kaj mi estas tre dankema al ĉiuj. Mi nur bedaŭras, ke migrante de loko al loko, oni ne havas eblecon pli profunde konatiĝi kun la homoj.

Nun mi malpli ŝatas vojaĝi, krom al la lokoj, kie loĝis miaj prauloj: genealogio estas pasio, kiu venis al mi pli malfrue ol la engaĝiĝo en Esperantaj aferoj. Krom unu escepto, ĉiuj miaj prauloj venis el Francio.

Resumante, kion mi ĝis nun faris por Esperanto, mi havas la impreson, ke kvankam mi ŝajne multon faris, mi ne faris sufiĉon. Eble aliaj havas tiun saman senton, ke oni povus fari pli.

Claude Nourmont
por la Panteono, la 11-an de decembro 2017.

Yves Nicolas nous a quittés



notamment responsable du club d'Hérouville-Saint-Clair, en Normandie. Rédacteur du *Bulletin normand d'espéranto*, il enseignait également l'espéranto et était correcteur pour les cours en ligne ikurso. Il a

C'est avec tristesse que nous avons appris le décès d'Yves Nicolas, survenu le 24 octobre. Espérantophone très actif, il fut

pendant de nombreuses années organisé les tournées de conférences d'espérantistes étrangers en France.

Il nous avait présenté cette activité dans le numéro 66 de la lettre d'information *Espéranto Aktiv'* :

<https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-66-decouverte>

Francio kaj Germanio: evoluo de ties lingvopolitiko koncerne siajn enlandajn lingvojn kaj dialektojn. Kelkaj konstatoj.

Nin intereso la lingvopolitiko de la franca ŝtato, iama kaj daŭre nuna.

La radio-elsendo *L'accent des autres* – La akĉentoj de la aliaj

L'accent des autres – La akĉentoj de la aliaj estas la nomo de elsendo de la franca radiostacio France-Inter. Tiu ŝtata

radiostacio laboras subteno al la promociado de la franca lingvo tra la mondo per la tiel nomata Organisation Mondiale de la Francophonie (Internacia Organizo por

Franclingvio). Ĝi prezentas – nur sabate, sed jam pli bone ol neniam – raportaĵojn el landoj, kie la franca lingvo estas parolata. Laŭ informoj ĝisdatigitaj en 2020, 300 milionoj da personoj parolas la francan lingvon – parte aŭ ekskluzive en sia ĉiutaga vivo aŭ por komunikado – en 88 ŝtatoj tra la mondo, ĉefe en eksaj kolonioj kaj en la nunaj restantaj “transmaraj teritorioj”. Ankaŭ la televida kanalo TV5 Monde – TV5 Mondo elsendas ĉi-cele. En grandaj urboj instruas la lingvon kaj diskonigas la francan kulturon la Instituts français (Francaj Institutoj).

Kompreneble ankaŭ la aliaj lingvoj parolataj surloke influas tie la elparolon kaj la vortprovizon de la franca lingvo. La nomo de la elsendo ja celas substreki la diversecon en komuneco – ĉefe ekster Francio, montrante ke multas tra la mondo la samlingvaj parencaj popoloj.

La aludo al la ĉi-kaze arig-cela signifo de la termino “akĉento” ja iel komikas, se oni pensas pri la kutima sinteno de la franca intelektularo kaj de la oficialaj instancoj, kiuj emas strebi al senakĉenta nacia lingvo en Francio mem por fortigi la nedisigeblian unuecan respublikon!

Antaŭnelonge elzasa deputito insistis pri sia regiona deveno parolante kun elzasa akĉento dum sesio de la franca

parlamento. Tujis mokaj ridoj de iuj parlamentanoj. Sed la prezidanto de la asembleo ĉesigis la mokadon. Eĉ la registaro poste deklaris, ke devas ĉesi ia ajn diskriminacio.

Ĉu estonte ŝanĝo al pozitiva sinteno rilate al enlanda lingva diverseco?

Nu: la 8-an de marto 2021 la franca parlamento adoptis leĝon, kiu atribuas al la ŝtataj elementaj lernejoj la rajton instrui dekomence plej intense en la regiona lingvo.

Kaj Germanio?

Dum longa tempo ankaŭ en Germanio decis paroli laŭ la prononcreguloj de la “Hochsprache” – la akademika germana. Ankaŭ en Germanio ŝikis paroli senakĉente la landan oficialan lingvon.

Kiel Francio, ankaŭ Germanio klopodas promocii sian landon tra la mondo per sia lingvo. Kompreneble ĝi apenaŭ disponas pri eksaj kolonioj (krom en Namibio k.a.), kie krome alia(j) lingvo(j) parolatas. Ankaŭ Germanio diskonigas radio-elsendojn pri Germanio pere de la en 1953 kreita radiostacio Deutsche Welle (Germana ondo). Ĝi elsendas ne nur en la germana, sed nun eĉ en 30 lingvoj. Aldoniĝis televida kanalo de Deutsche Welle, kiu elsendas en kvar lingvoj, ankaŭ retaj elsendoj nun tutkompreneble uzeblas.

Temas pri informoj pri Germanio mem, ne ĉefe pri la lingvo. Sed en grandaj urboj de multaj landoj la Goethe-Institutoj instruas la lingvon kaj organizas kulturajn aranĝojn.

Agnosko de la akĉentoj

Koncerne la akĉentojn, retroa fenomeno konstateblas en la aŭdvidaj dissendiloj: dum intervjuoj de loĝantoj okaze de raportaĵoj, la intervjuatoj ne hezitas res-

pondi per sia regiona dialekto, pli-malpli aŭtente fidela, ofte kun nura leĝera loka prononco, kion ili nun faras senkomplekse. La samo kompreneble okazas en la multaj regionaj kaj lokaj televidaj kaj radiaj kanaloj ŝtataj aŭ privataj.

La ŝtata televido-programo 3SAT proponas al la spektantoj kulturajn programojn de la germanaj ŝtataj televidokanaloj ZDF, ARD, de la regionaj kanaloj, de la svisaj kaj aŭstraj ŝtataj televidoj kaj radioj.

La uzataj regionismoj estas plejofte kompreneblaj de la germanaj spektantoj/aŭskultantoj, sed eksterlanda spektanto, kiu lernis la germanan lingvon kaj trejniĝis nur por kompreni kaj paroli la akademian germanan lingvon unue malfacile komprenos la elsendojn kun la regiona varianto de la lingvo. 3SAT tamen supozas, ke ankaŭ germanaj spektantoj/aŭskultantoj malfacile komprenas la elsendojn el Svislando ĉe 3SAT; ĝi do kutimas aldoni subtitoladon en la germana akademika lingvo, kiam la diversaj svisaj variantoj tro malproksimas de la oficiala germana. Tio ne necesas por la aŭstraj variantoj. La privata aŭstra televido-kanalo ServusTV prezentas programojn el la diversaj regionoj de Aŭstrio plej ofte en la diversaj dialektovariantoj de la lando kaj tiel reklamas pri la lando en aliaj germanlingvaj landoj kaj regionoj. En ne-regionaj elsendoj la lingvo parolata elradias tutlande ielan vian akĉenton.

La 2 ĉefaj germanaj ŝtataj televidoj (ARD kaj ZDF) ankaŭ allogas siajn spektantojn per la dissendado de krimfilmoj, kies intrigon ili okazigas en diversaj germanaj urboj aŭ regionoj, ankaŭ aŭstraj kaj svisaj, eĉ Elzaso aŭ Loreno foje kunlaboras. Jen okazo por prezenti bildojn de la urboj aŭ regionoj kaj tiel reklami por turismo, sed tiam la akĉento plejofte leĝeras. Tio tamen sufiĉu por substreki la lokan apartecon kiel parton de vasta germanlingvio.

Edmond Ludwig

Gvidlibro Spacerkiem po Wrocławiu – Promene tra Vroclavo

En decembro 2021, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej), en Vroclavo (Pollando), eldonis la gvidlibron *Spacerkiem po Wrocławiu – Promene tra Vroclavo*, kadre de programo financata el rimejoj de la urbo Vroclavo (www.wroclaw.pl) kaj ĉe la kunlaboro de la Vroclava Centro de Socia Disvolviĝo (Wrocławskie Centrum Rozwoju Społecznego) kaj de la Societo de Vroclavo-Amantoj (Towarzystwo Przyjaciół Wrocławia). La gvidlibro estis preparita de pliaĝuloj. Tamen la hodiaŭa generacio de pliaĝuloj 60+ estas ĉefe generacio de personoj, kiuj estas scivolaj pri la mondo. Ili do estas aktivaj kaj ili celas realigi neplenumitajn revojn el sia junaĝo. En la listo de tiuj revoj estas ĉefe vizitado...

Preparante la gvidlibron ni konsideris la rimarkojn, dezirojn kaj sugestojn de tiuj, kiuj testis ĝin, elektante allogajn, pli aŭ malpli facilajn irvojojn, por ebligi promenantojn viziti laŭ sia ritmo. Vizitanto povas elekti por si kontentigan varianton aŭ libere komponi elektitajn variantojn. La urbon oni povas viziti dum unu tago, unu semajnfino aŭ pli longe, depende de la tempo, kiun oni dediĉas al vizitado.

Tiu libro ne estas kompendio de scio pri Vroclavo, nek provo de konkurenco kun iu ajn profesia prilaboro pri la urbo. Kreinte tiun gvidlibron, mia ambicio ne estis multobligi jam ekzistantajn perfektajn, precipe historiajn prilaborojn pri Vroclavo. Per la enhavo de la gvidlibro mi klopodis instigi piedire viziti la urbon. La ekskursoj estu neforgeseblaj travivaĵoj kaj plezuroj, ĉar Vroclavo estas escepta urbo. Ni konsideris lokojn por ripozi, manĝi, tempon por vizitado kaj informojn pri la rekomenditaj objektoj.




La gvidlibro konsistas el kelkaj partoj. Ni mallonge prezentas la preparolitan historion de Vroclavo kaj la irvojojn. En ĉiu irvojo, la rekomenditaj objektoj estas punkte markitaj kaj skribitaj per dikaj literoj kaj poste ili estas pli precize priskribitaj. En la gvidlibro estas ankaŭ mapoj de ĉiu irvojo, ankaŭ disponeblaj rete, tiel ke oni povas facile vidi per poŝtelefono dum promenado. Ĉiu parto de la irvojo havas sian koloron, por ke la leganto facile trovu informojn.

La gvidlibro estas eldonita dulingve, pole kaj Esperante, por substreki la rolon de la universala lingvo Esperanto en la internacia interkomuniko.

La laboro por prepari la gvidlibron estis tre malfacila kaj plena je provokoj, kiel la maljunaĝo mem, des pli ke ni multe laboris dum la pandemia tempo KOVIM-19. Ni ne povis ĉiuj kune samtempe testi la projekton preparitan ĉe la skribotablo, priparoli ĉiun problemon aŭ elekti fotojn... Ni adaptiĝis al la ĝeneralaj ordonoj limigante la kvanton de la personoj, kiuj testis la gvidlibron kaj kiuj trapaŝis la testatajn vojojn, eĉ dufoje por certeco. Preparitajn irvojojn testis Irenka Solarek, Joasia Kwiatkowska, Boguś Partyka kaj Tereska Tadeuszycz. Ceterajn kontaktojn ni limigis ĉefe al telefonaj kaj retaj renkontiĝoj des pli, ke ni sukcesis kunlabori kun eksterlandanoj dank' al la lingvo Esperanto. Grafike plibeligis la tekston franca esperantistino Emmanuelle Richard, kiu ankaŭ projektis la kovrilpaĝon. Emmanuelle kune kun Svetlana Pogorelaja el Ukrainio, Utho Maier el Germanujo kaj Jolanta Zarębska el Pollando kontrolis la gvidlibron.

Tiu libro estas kolektiva laboro de esperantistoj kaj neesperantistoj. Ĝi estas la rezulto de la agoj de multaj pliaĝuloj kaj ilia sindona helpo. Sen kunlaboro de la tuta grupo, la gvidlibro estus nur mia revo.



Ni pasigis multajn belajn momentojn kaj ni ellernis multe. Por ĉiu el ni, tiu laboro estis granda defio kaj interesa sperto. Testante la preparitan planon de irvojoj, ni mem denove ekkonis la urbon, en kiu parto el ni naskiĝis. Tiu aventuro ebligis al ni ankaŭ viziti lokojn antaŭe konatajn, reveni al la jaroj de infanaĝo kaj junaĝo, sed antaŭ ĉio amikiĝi kaj konstati, ke dum tiuj promenadoj, al ni ne malhelpis kaprico de la vetero ĉar ĉiam akompanis nin humoro, ĝojo, rideto kaj scivolo. Ni ankaŭ rimarkis kiel plibeligiĝis nia urbo, kiel ĝi dinamike disvastiĝas, ŝanĝiĝas, kaj tio konsciigis al ni kiel ni ĝin amas kaj kiel multe ni estas pri ĝi fieraj.

Preparante la gvidlibron, ni pli bone ekkonis ne nur nin mem, sed ankaŭ multajn interesajn homojn. Ni ellernis esti tolerantaj kaj akcepti tion, ke ĉiam oni devas atendi nur pli belajn momentojn...

Mi invitas al aktiva vizitado, sed ankaŭ al ripozado en Vroclavo.

Małgorzata Małgosia Komarnicka
Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

La mapoj de la gvidlibro estas videblaj ankaŭ ĉe <http://u.osmfr.org/m/693333/>

Dernières parutions chez Vinilkosmo

Nouvel album numérique *Pli kaj plu* de KORVAKS



Un an après son premier EP¹ *Memorante Gondolandon*, Korvaks est de retour avec une autre série de goodies inspirés de Gondoland dans *Pli kaj plu*.

Korvaks (Auckland, Nouvelle-Zélande) livre cet album de 15 titres qui perpétue son style électronique, donnant un peu plus de variété, en jouant même de la guitare.

Nous vous proposons donc de découvrir cette seconde édition de Kovaks en vous présentant *Pli kaj plu* gratuitement en téléchargement libre sur :
<https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/pop-rock-hip-hop-electro/korvaks.html>

¹ EP : « Extended Play ». Il s'agit d'un format rassemblant plusieurs titres, en général 4 ou 5, donc moins qu'un album, qui contient souvent 15 à 20 titres.

Sortie officielle de la compilation *ESPERANTO SUBGRUNDE Vol.2*


<https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/compilations/8-esperanto-subgrunde-2/1-esperanto-subgrunde-2.html>

C'est en mars 2022, après une longue attente, qu'est enfin apparue la compilation *ESPERANTO SUBGRUNDE Vol.2*, en physique sur double CD, en numérique et streaming.

Cette compilation présente du punk rock alternatif underground avec des textes en espéranto contre la discrimination linguistique et l'inégalité, contre le racisme et le fascisme, contre l'impérialisme et le chauvinisme

culturel, contre le sexisme et l'injustice sociale, contre la guerre et les barrières entre les peuples. Elle choisit d'autres valeurs telles que la liberté, la paix dans le monde et la communication entre les peuples sans barrières !

La compilation soutient le projet éducatif alternatif et solidaire de L'Escuelita (détails sur le projet disponibles sur la page album).



Intergalaksia, nouvel album en espéranto de Vojaĝo



À découvrir sur : <https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/chanson-traditionnel-progressive/vojaĝo.html>

Pour ce nouvel album, les musiciens de Vojaĝo cherchaient une autre voie dans un style lié aux aspirations du moment mais qui puiserait aux sources du rock progressif, du jazz-rock, du world Jazz, du nu-jazz et de la musique classique contemporaine. Comme dans le premier album, *Planedo nia*, les

paroles d'*Intergalaksia* sont résolument engagées pour la défense de la nature et l'amitié entre les peuples. Vojaĝo choisit à nouveau d'écrire ses textes en espéranto. Cette fois, une large part est réservée à la musique rythmée soit par des poèmes, soit par des chants en espéranto.

Banĝo Esperanto le premier EP en espéranto d'Armél Amiot


Banĝo Esperanto est le titre de la première œuvre musicale en espéranto d'Armél Amiot, un nouvel artiste espérantophone de Normandie (France).

L'EP contient 6 chansons dans les styles Jazz Swing, Créole et World Jazz avec le banjo comme instrument principal.

Vous serez surpris par cette première œuvre d'Armél en espéranto !

À découvrir et à commander sur :

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/chanson-traditionnel-progressive/armel-amiot.html>



Kvazaŭ korpo sen koro, nova afrika E-filmo



Estas frukto de 2-jara kunlaboro inter la Esperanto-Klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kaj Kina Klubo "La Patience" de Rutshuru, Norda Kivuo, en DR Kongo, laŭ kuninstigo kaj traduka laboro de Joël Muhire N. kaj Kambale Amani Love.

La filmo aperis la 7-an de novembro 2021, kaj ĝi spekteblas en du partoj ĉe:

<https://youtu.be/fOgcD8eFXIE>

kaj <https://youtu.be/qv0WUYENO2s>

La filmo prezentas ampleksan bildon pri konstanta malfacila vivo en la orienta parto de DR Kongo, ekster la pli krue-laj pertranĉilaj murdaj scenoj en Beni far ADF NALU.

Espero, la ĉef-rolulino, havis normalan vivon kaj ardan revon iĝi la plej bona kaj lerta atletino de sia generacio. Sed iam pro konfliktoj naskiĝintaj en ŝia loĝoloko rezulte de politikaj voĉdonadoj, ŝi kaj aliaj samaĝulinoj bedaŭrinde perforte forkaptiĝis. Dum sia forkaptado, ili devis kontraŭvole servi en ribela grupo kun la nomo Movado de Sentima Generacio, kie ili ĉiuj plurfoje estis sekserfortitaj kaj truddevigitaj murdi. Finfine danke al la klopodoj de la familio kaj kunlaboro inter pluraj personoj kaj publikaj instancoj, Espero kaj ŝiaj amikinoj liberiĝis...

El la sentem-anima vidpunkto enhavaj scenoj estas malhumanigaj, sed bedaŭrinde ja temas pri aferoj vere okazintaj surloke en DR Kongo kaj en multegaj aliaj landoj sur la kontinento. Krom tiu ĉi teruriga aspekto, la produktaĵo tamen estas kortuŝa, interesa kaj lingve kaj scenenhave. La paroloj de la aktoroj, kun subtekstoj en la franca, estas klare aŭdeblaj kaj tuj komprenataj. Tiu ĉi filmo ne nur rekomendindas por pli lertaj esperantistoj, sed ĝi taŭgas ankaŭ por komencantoj.

Esperanto-Klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kaj la Kina Klubo "La Patience" de Rutshuru formiĝas kiel tuta reto de kunlaborantoj por fari filmojn kun ligo al edukado, kulturo kaj distro, cele informi pri la rajtoj de virinoj precipe en lokoj, kie estas militoj aŭ konfliktoj. *Kvazaŭ korpo sen koro* estas ilia unua filmo, kaj ili esperas progresi, liverante pliajn instruajn filmojn al la esperantistaro, kies komentojn kaj kunlaborojn ili volonte kaj dankeme bonvenigas por la poluro de siaj verkantaj projektoj.

Ekde la komenco de *Kvazaŭ korpo sen koro* helpis per vasta informado kaj diskonigado Renato Corsetti, unu el la konsilantoj de la Afrika Komisiono de UEA, Germain Pirlot kaj Jean-Pierre Marcq. Same gravas menciigi la kontribuon ankaŭ de s-anoj Ulrich Matthias kaj Kiah Morante, Miriadano, kies monsubtenoj, korektoj kaj konsiloj necesis por plene realigi la tutan projekton.

Adjévi Adjé

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2022

Estis aljuĝitaj la agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) de la 73-a eldono de la **Belartaj Konkursoj de UEA** (BK). Gvidis la ceremonion en la 107-a Universala Kongreso de Esperanto la vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., kun subteno de la eks-estrarano Sara Spanò. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández. Al la grundo de la 73-a eldono de la BK estis semitaj entute 173 verkaĵoj.

Branĉo Poezio

La unua premio estas nealjuĝita.

Dua premio: *Reĝino-nokt* de Evgenij Georgiev el Kazahio

Tria premio: *Mi ŝatus vidi...* de Benoît Philippe el Germanio

Gajnis honoran mencion la verkoj:

La lampiro de Sylvain Barrier el Francio

Cimbalaro de Evgenij Georgiev el Kazahio

Branĉo Prozo

Unua premio: *Rekviemo* de Sara Spanò el Germanio.

Dua premio: *La pentraĵo* de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

Tria premio: *Speguloj* de Sara Spanò el Germanio.

Gajnis honoran mencion la verko:

Strato Memoro de Tobiasz Kubisiowski el Pollando.

Subbranĉo Mikronovelo

Unua premio: *La nigra truo* de Emanuele Bovio Regano el Italio

Dua premio: *La bela kaj la bestio* de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

Tria premio: *Kiu ĉeas?* de Pascal Vilain el Francio.

Gajnis honoran mencion la verko:

Laŭmorale de Christian Rivière el Francio.

L'esperanto, langue dangereuse, d'Ulrich Lins

Publié pour la première fois en 1973, en espéranto sous le titre *La danĝera lingvo*, ce livre d'Ulrich Lins a connu plusieurs rééditions en espéranto et a été traduit dans une dizaine de langues.

La version française qui vient de paraître est la traduction du texte de 2016, qui avait été profondément révisée et enrichie grâce aux sources devenues accessibles après la chute du Mur de Berlin.



Cette traduction est le fruit du travail d'une équipe d'esperantophones qui, pendant deux ans

et demi, ont traduit, revu et peaufiné le texte, dans le respect du style de l'auteur. Le texte est complété de nombreuses notes et références. La traduction française a été coordonnée par Pierre Dieumegard.

Le livre est disponible au format papier et au format électronique (PDF).

Vous pouvez le commander à votre librairie ou directement sur la boutique de L'Harmattan :

<https://www.editions-harmattan.fr>



Amour, toux et mort

Finalistes du Concours interculturel de nouvelles

Les humains et le Covid. Soixante-neuf nouvelles ont été écrites pour le *Interkultura Novelo-Konkurso*. Trente, issues des 6 continents, ont été sélectionnées pour ce recueil. Quelle autre langue que l'espéranto pourrait permettre un tel éventail de diversité ? Même pandémie, expériences différentes, histoires fictives diverses. Réagissons-nous de la même manière face à un virus ? La réponse est dans ce recueil.

Amo, tuso kaj forpaso

Finalistaj noveloj de la Interkultura Novelo-Konkurso

Homoj kaj Kovimo. Por la *Interkultura Novelo-Konkurso* estis verkitaj sesdek naŭ noveloj. Tridek, el 6 kontinentoj, estis elektitaj por ĉi tiu novelaro. Kiu lingvo krom Esperanto povus ebligi tiom ampleksan diversecon? Sama pandemio, malsimilaj spertoj, diversaj fikciaj rakontoj. Ĉu ni reagis same fronte al viruso? La respondo estas en ĉi tiu novelaro.

114 p.

ISBN 978-80-88326-30-4

KAVA-PECH

Branĉo Teatraĵo

La unua premio estas nealjuĝita.

La dua premio estas nealjuĝita.

Tria premio: *La bakisto kaj la profeto* de Raffaele Del Re el Italio

Subbranĉo Monologo aŭ Skeĉo

La unua premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas nealjuĝita.

Tria premio: *La Sekvanta* de Amir Naor el Israelo.

Gajnis honoran mencion la verkoj:

Kurtfilmo de Ewa Grochowska el Francio.

Helpoferto de Stela Besenyei-Merger el Hungario.

Enkonduko al "La Krizolo" de Brandon Sowers el Usono.

Infanlibro de la Jaro

La premio estas aljuĝita al la **Eldonejo Esperanto-Asocio de Britio**, pro la verko *La domo ĉe Pu-Angulo* de A.A. Milne.

Branĉo Eseo

La unua premio – Premio Luigi Minnaja ne aljuĝita.

Dua premio: *Komparo inter Esperanto kaj Okcidentalo* de Emanuele Bovio-Regano el Italio.

Tria premio: ne aljuĝita.

Gajnis honoran mencion la verkoj:

Halka kantas esperante de Roman Dobrzyński el Pollando.

De hilelismo al Homaranismo: Ĉu nova hipotezo? de Roberto Lloancy el Francio.

Branĉo Kantotesko

Unua premio en egaleco: *Ne foriru* de Ewa Grochowska el Francio, kaj *Menestrelo* de Nikolaj Nechajev el Rusio.

Dua premio: *Kiel la Tero belas* de Ewa Grochowska el Francio.

Tria premio: *De kie vi estas?* de Federico Gobbo el Nederlando


Gratulojn al ĉiuj partoprenintoj!

Mallonga ligilo por tiu ĉi komuniko: <https://uea.org/gk/1053a1>

Info: *Gazetara Komuniko de UEA* n-ro 1053 (2022-08-08)

Accélérateur de multilinguisme • Multlingva akcelilo

Support pédagogique pour les écoles élémentaires.



Documents téléchargeables sur <https://mla.esperanto-france.org/>

Ce support de cours est adapté pour les élèves du cycle 3 des écoles élémentaires (CM1 - CM2)

- Édition entièrement revue et corrigée
- **Nouvelle mise en page** optimisée : les feuilles à imprimer ont été rassemblées dans des cahiers au format A4
 - ▷ pour l'enseignant : un guide de 84 pages comportant un mémento de grammaire et le plan détaillé de chaque leçon, ainsi que les corrigés des exercices (nouveau dans cette édition !)
 - ▷ pour chaque élève : un cahier de 68 pages tout en couleur, avec tous les textes et exercices du cours
- **Cartes à découper** : 15 planches de cartes imprimées sur papier épais pour une utilisation plus facile
- **Fichiers audio** : à télécharger sur <https://mla.esperanto-france.org>
- **Exercices en ligne** sur <https://lernu.net/instruado/ekzercoj>

Esperanto-France fournit gratuitement une version imprimée de ces documents aux établissements scolaires souhaitant mettre en place ce cours.